


1989 novembro
82-a jaro
n-ro 1007 (11)
(aperas monate escepte de aŭgusto)

esperanto

ISSN 0014-0635

universala esperanto-asocio (en konsultaj rilatoj kun un kaj unesko)
sidejo: nieuwe binnenweg 176 • 3015 bj rotterdam • nederlando

Foto: Unesko/P. Almasv



Kial kaj kiel alfabetigi la mondon?

Vi trovos,

ke niaj novaj landaj asocioj en Sovetunio alvenis ne nur en la Komitaton, kiel anoncite en septembro, sed plenigis ankaŭ kvinonon de ĉi tiu numero per novaĵoj. Ne plu temas pri onidiroj kaj hazardaj kontaktoj. Vi povos legi kontraastajn pritaksojn de la sovetia movado, inspiro de la atingoj ĉe *Moskvaj novaĵoj* kaj la eldonejo "Progreso", kaj – precipe – ĉerpi el abundo da adresoj por flegi pli proksimajn kontaktojn. Dependas de vi (kiel plia sovetiano argumentas sur alia paĝo), ĉu la intereso pri Esperanto daŭros kaj kreskos en malfermiĝanta socio, ĉu ĝi kontraŭe baldaŭ velkos sub la konstato, ke aliaj lingvoj pli bone respondas al la sopiro de mondskala komunikado. La falo de muroj en orienta Eŭropo starigas al ni ĉiuj defion. Altiĝos la postuloj je internaciaj kontaktoj, fortiĝos la konkurenco. Kiel ni aktualigu la kapablojn de la movado? Pri tio vi legos hungaran opinion venontnumere; kial ne surpaperigu la vian kaj feliĉigu nian leterkeston?

Enhavo

- 181 Dum la mondo frontas severan edukokrizon, Unesko lanĉas Internacian Alfabetigan Jaron (Cilla Ungerth Jolis)
- 182 Belartaj Konkursoj de UEA en 1990
- 183 Esplorvojaĝo tra Azio: Bona, sed malfacila tero en Tajlando; En Vjetnamio regas soifo al la praktikado (Joachim Werdin)
- 184 Junularo: Impresoj el Bulgario (2) (Bernhard Westerhoff)
Kulturo: Ĉu ni ŝparas nian historion? (Ulla Luin)
- 185 Landa agado: Ĉu perestrojko pereigos la unuecon de sovetiaj esperantistoj? (Andy E. Künzli)
- 186 Kure tra Sovetio
- 187 Intervjuo kun Sergej Kuznecov: La sovetia movado finfine ekvivas
- 189 Miyamoto Masao (1913-1989) (Ulrich Lins)
- 190 Apliko: Inter mal- kaj mem-kontento (Aleksandr Fjodorov)
- 191 Recenzoj: *Jubileo – jarcento de Esperanto*, red. Mark Fettes (W. Auld); *Terra de István Nemere* (James F. Cool); *Dum vi estis kun ni* de István Nemere (Georgo Kamaĉo); *Bestoj kaj homoj* de Bernard Golden, *Patrina koro* de Nevena Nedelĉeva, *Mistera lumo* de Julian Modest (Giulio Cappa); *Amo, amor, adoro* de Mira Andrusiewicz, *Vagante tra la mondo maltrankvila* de Nadija Hordijenko-Andrianova, *Enlumiĝo* de Albert Goodheir, *Tri 'stas tro* de Gerrit Berveling (Aldo de'Giorgi); *Desislava ridetas* de Giorgio Silfer (Nikolaj Lozgaĉev)
- 195 Laste aperis... (novaj eldonaĵoj en aŭ pri Esperanto)
- 196 Reagoj: Ne kritiku! – uzu! (Bertilo Wennergren, Preben Bagger); Praktiko laŭ prediko? (Bertil Englund); Ankoraŭ pri la simbolo (Umberto Stoppolini, Kultura Asocio Esperantista); Bonega okazo iomete fiaska (Hilmar Ilton Santana Ferreira); Fine pri transitiveco (Heinrich Ringli, Alan Towsey)
Nekrologoj
- 198 Foliume (pripresaĵaj raportetoj)
Loke – Fake – Persone (mallongaj novaĵoj)

La kovrilo

Pri legipovo temas ne nur la ĉefartikolo, kvankam tiu plej trafe atentigas pri la vasteco de la problemo. Ankaŭ nia tuta Esperanta agado estas iuspeca alfabetiga kampanjo – ĉar lingvaj baroj senigas ĉiujn je legipovo. Kaj eĉ tie ni eble subtakso nian taskon. Ĉu vi iam eksuspektis, ke granda parto de la esperantistoj estas funkcie nelegipovaj? Tion sugestas interalie la veinda vendoritmo de eĉ plej bonaj fakaj kaj distraj verkoj. La ĉi-numeraj recenzoj celas logi vin alfabetiĝi pli profunde. "Elturniĝi pri ĉiuj postuloj de la moderna vivo": jen tasko ne nur por individuoj, sed ankaŭ por movadoj. Ĉu ni venkos la propran edukokrizon? Kaj ĉu ni sukcesos, nun kaj estonte, roli en solvo de la alia?

esperanto

Oficiala organo de
Universala Esperanto-Asocio

Aperas monate (escepte de aŭgusto).

Fondita en 1905 de M. P. Berthelot (1882-1910); **establita** kiel organo de UEA en 1908 de Hector Hodler (1887-1920). **Legata** en 105 landoj. **Voĉlegata** por blinduloj.

Redaktoro: Mark Fettes.

Abonprezo: varias laŭlande (gld. 48,75; US\$ 23; GM 39; enoj 3600; ktp); petu informojn ĉe via landa asocio aŭ de la ĉi-suba adreso. Unuopa ekzemplero kostas 4,00 guldenojn. **Anonctarifo** (gld.): 1 p. 1540, 1/2 p. 850, 1/4 p. 470, 1/8 p. 260, 1/16 p. 150. Movada rabato 50%. Eksterakvirlaj anoncoj kostas duoble. Rabato por tuja ripeto 20%.

Adreso de la CO de UEA: Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando.

Telefono: +3110 436 10 44 kaj 436 15 39.

Telefakso: +3110 436 17 51.

Telekso: 23721 uea nl.

Telegramoj: ESPERANTO ROTTERDAM.

Banko: Bank Mees & Hope, Postbus 749, NL-3000 AS Rotterdam (konto n-ro 25.52.89.804). **Nederlanda poŝta ĝirkonto:** 37 89 64 (ĝiroficejo Den Haag).

Ĝenerala Direktoro: Simo Milojević.

Direktoro de la CO: Neil Salvesen.

Estraro de UEA

Prezidanto (kunordigado, planado): prof. d-ro John C. Wells, 5 Poplar Road, London, Britio SW19 3JR; tel. (01) 542 0302; telefakso (01) 380 7408.

Vicprezidanto (regiona agado, turismo, Fondumo Zamenhof): s-ro Roman Dobrzyński, u. Majdańska 13 m 91, PL-04-088 Warszawa, Pollando; tel. (22) 10 35 05.

Vicprezidanto (eksteraj rilatoj, esperantologio): d-ro Ulrich Lins, Gemarkenstr. 150, D-5000 Köln 80, FR Germanio; tel. (0221) 680 32 50.

Ĝenerala Sekretario: s-ro Osmo Buller, Suksitie 4 B 15, SF-93400 Taivalkoski, Finnlando; tel. (988) 51 003; telefakso (988) 51 681.

Estrarano (informado): s-ro Ivo Durwael, Paul Gilsonlaan 5, B-2520 Edegem, Belgio; tel. (03) 440 30 92.

Estrarano (financo, junularo): s-ro Grégoire Maertens, Pr. Leopoldstr. 51, B-8310 Brugge, Belgio; tel. (050) 35 49 35.

Estrarano (landaj kaj fakaj asocioj): s-ro Oszkár Princz, Sallai u. 4. II.3, H-1136 Budapest, Hungario; tel. (HEA) (1) 15 60 244.

Estrarano (azia agado, aplikado en scienco): prof. d-ro So Gilsu, Yangchon PO Kesto 12999, Seoul - 158-600, Korea Respubliko; tel. (02) 646 5413; telefakso (02) 275 0633.

Estrarano (kulturo): s-ino Spomenka Štimec, Nova Ves 87, YU-41000 Zagreb, Jugoslavio; tel. (041) 42 92 51.

Observanto (Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj [ILEI]): s-ro Edward Symoens, Putsesteenweg 131A, B-2180 Kalmthout (Heide), Belgio; tel. (03) 666 62 66.

Observanto (Tutmonda Esperantista Junulara Organizo [TEJO]): s-ro Jan Koszmaluk, 8 Villa Stendahl, F-75020 Paris, Francio; tel. (1) 43 66 63 47; telefakso (1) 43 66 09 92.



Togolanda bazlernejo

Dum la mondo frontas severan edukokrizon, Unesko lanĉas Internacian Alfabetigan Jaron

Kiam ili subskribas, temas pri la premspuro de dikfingro.

Ili estas ofte trompataj kaj ekspluatataj. Ili sentas sin senpovaj kompreni aŭ influi decidojn, tuŝantajn ilian vivon.

Ili estas, plejparte, senlaboraj aŭ malbone pagataj.

Ili ofte perdiĝas vojaĝante, ĉar ili ne scias legi la bus- kaj vojindikilojn.

Minacas ilin, kaj iliajn infanojn, mortdanĝero, ĉar ili ne scias legi la etiketojn aŭ uzregulojn por medikamentoj.

Ili estas la nelegipovuloj tra la mondo, preskaŭ miliardo da homoj.

“Oni sidas en mallumo,” diras virino kiu povas nek legi, nek skribi. “Kvazaŭ vivi en alia mondo,” ŝi aldonas.

Pasis jam du jardekoj da progreso en la disvastigo de baza edukado kaj la lukto kontraŭ nelegipovo. Sed malgraŭ ĉi tiu progreso, vastaj regionoj de la mondo frontas edukokrizon. Laŭ Unesko, pli ol kvarono de la plenkreskularo de la mondo ne povas legi. Cent milionoj da infanoj ne havas lernejon, kiun ili povas frekventi.

“Edukado estas la ŝlosilo al la estonteco, kaj scii legi kaj skribi estas la plej esenca edukaĵo,” diras Federico Mayor, la ĝenerala direktoro de la Organizaĵo de Unuiĝintaj Nacioj por Edukado, Scienco kaj Kulturo. Jen la kialo, li daŭrigas, ke la Ĝenerala Asembleo de UN proklamis 1990 Internacia Alfabetiga Jaro kaj taskis Uneskon kunordigi ĝin.

Por Colin M. Power, asista ĝenerala direktoro por edukado ĉe Unesko, la jaro celas “doni novan impulson al la alfabetigaj streboj tra la mondo, kaj meti la alfabetigon inter la plej altajn prioritatojn de la evoluiga programo.” “La plej maltrankviliga aspekto,” li aldonas, “estas ke la problemo povas ŝajni nesolvebla. Por multe tro granda nombro da homoj, ne povi legi estas realaĵo de la vivo, sorto neŝanĝebla, kaj heredaĵo kiu transiras de generacio al generacio.”

Estas kvazaŭ ombro

La statistiko pri nelegipovo prezentas pesimisman bildon. Multaj evoluantaj landoj, pro la lastatempa ekonomia krizo kaj retroiro, devis tranĉi siajn sociajn kaj edukajn programojn. Pli ol 98% de la nelegipovuloj loĝas en la evolulandoj; pli ol du

trionoj estas virinoj. La plej altan proporcion de nelegipovo oni trovas en Afriko, kie pli ol duono de la loĝantaro povas nek legi nek skribi.

Sed eĉ la industria landoj malkovris gravan, ofte kaŝitan problemon de funkcia nelegipovo, t.e. la nepovo legi kaj skribi sufiĉe bone por elturniĝi pri ĉiuj postuloj de la moderna vivo. En Usono, laŭ diversaj taksoj kaj difinoj, troviĝas inter 17 kaj 65 milionoj da funkcie nelegipovaj plenkreskuloj. En Kanado, enketo de la tutlanda ĵurnalgrupo “Southam Incorporated” rezultigis ŝokan konstaton: unu el kvar kanadanoj ne sufiĉe scias legi, skribi aŭ kalkuli por respondi al la postuloj de la ĉirkaŭa socio.

“Estas kvazaŭ ombro, ĝi ĉiam ĉeestas,” diras kanadanino Lome Gibson pri sia nepovo legi. Ŝi aktuale sekvas kurson.

Du aliroj

La programo de Unesko antaŭvidas du alirojn por forigi la nelegipovon: universaligon de la baza edukado por la infanoj, kaj lanĉon de vastaj programoj por la needukitaj junularo kaj plenkreskularo.

“La edukadon de infanoj fiksas grandparte iliaj gepatroj, plejparte ilia patrino,” atentigas Power. “Tial investi en la edukado de la gepatroj duoble efikas: unuflanke por klerigi ilin, aliflanke por plibonigi la edukajn ŝancojn de iliaj infanoj.”

Iuj ekspertoj pri la evoluiga agado tamen pridubas la prioritatecon de la alfabetigo. Lau ili, la mondo frontas pli urĝajn problemojn kiel la malsato, la misnutro kaj la malsano; kial ne ataki ĉi tiujn, antaŭ ol entrepreni alfabetigan kampanjon? Sed por Unesko, la povo legi situas centre en ĉiu san- kaj evolu-agado, ne nur ĉar ĝi ebligas al la homoj esti sendependaj, informitaj kaj memrespondecaj, sed ankaŭ ĉar ekzistas rektaj ligoj inter la povo legi, unuflanke, kaj la povo pluvi kaj produkti aliflanke.

“Hodiaŭ ni havas pruvojn, ke la aliro de virinoj al formala edukado, ilia povo legi kaj skribi, estas verŝajne la plej grava faktoro en malpliigado de la mortemo de virinoj kaj infanoj,” precizigas Power. Li rakontas tiuteme pri juna etiopia patrino, nelegipova, kies bebo malsaniĝis. “Ŝi kuris al kliniko por

konsulti kuraciston. Tiu ĉi donis al ŝi medikamenton kaj klarigis ĝian uzon. Reveninte hejmen, ŝi trovis ke ŝi forgesis la konsilojn. Do ŝi ĵetis sin al najbarino kiu sciis legi, por havigi klarigon de la etikedo. Sed daŭris tiom longe, trovi la amikino, ke la bebo estis jam preskaŭ mortinta.”

Bona ŝanco

Unesko esperas multon el Internacia Alfabetiga Jaro: unue vastan konsciiĝon pri la problemoj, kaj due, el tio, konkretan agadon kontraŭ la nelegipovo. Evidente ne temas pri tio, ke la nelegipovon oni povas en unu jaro elimini, aŭ eĉ “amase malpliigi”. Decida estos la venonta jardeko. Unesko lanĉos planon pri ĝi venontjare, cele helpi siajn Ŝtatojn-Membrojn malpliigi tra tiu periodo la nombron de siaj nelegipovuloj. Tiu plano plukonstruos sur la programoj de la Organizaĵo en Latina Ameriko kaj Karibio, Afriko, Arabio kaj Azio-Pacifiko.

Unesko ankaŭ kunlaboras kun tri aliaj organoj de UN – UNICEF, la Monda Banko kaj la Evoluiga Programo de UN – por lanĉi tutglobole edukadon iniciaton, kadre de internacia konferenco okazonta en Tajlando de la 5-a ĝis la 9-a de marto 1990. Tiu ĉi “Monda konferenco pri edukado por ĉiuj: respondi al la bazaj lernbezonoj” devus konduki al nova interkonsento de la monda gvidantaro kaj ĝia konsilantaro. Kune oni rekonos la gravecon de nova engaĝiĝo, nacia kaj internacia, por kontentigi tiujn lernbezonojn.

La problemoj estas komplikita de alta naskonombro kaj ekonomia retroiro en multaj evoluantaj landoj. Ne povas temi do nur pri afero de la publika sektoro. Unesko trovas ke la privataj entreprenoj, speciale neregistaraj organizaĵoj kaj lokaj iniciatoj, devas aldoni siajn fortojn al la streboj de la registaroj.

“Atingi universalan legipovon postulos grandegan kolektivan fortostreĉon,” opinias Power. “Ni bezonos la partoprenon de registaroj, inter- kaj neregistaraj organizaĵoj, kaj centoj da milionoj da komunumoj kaj individuoj tra la mondo. Sed ekzistas bona ŝanco. Multaj landoj, kiel Bharato kaj Ĉinio, jam lanĉis grandskalajn alfabetigajn kampanjojn, kaj neregistaraj organizaĵoj jam mobilizas sin por aktiva engaĝiĝo. La tuto akiras ian impeton. Idealon ni ekfaras realo.”

Cilla Ungerth Jolis, Unesko (trad. mf)

Tiu ĉi artikolo estas la unua el tri pri Internacia Alfabetiga Jaro. En la venontaj du ni rigardos pli vaste la sociajn sekvojn de (ne)legipovo, kaj ekzamenos ĝian rilaton al la Esperanto-movado. Ni bonvenigas represon de ĉi tiuj artikoloj.

Unesko eldonas bultenon pri la Jaro en la angla, franca, hispana kaj araba. Ĝi ankaŭ produktis materialojn pri diversaj aspektoj de la temo en la angla, franca kaj hispana, kaj afiŝon en ĉiuj ses oficialaj lingvoj (t.e. ankaŭ la ĉina kaj rusa). Petu detalojn de: Sekretariato, Internacia Alfabetiga Jaro, Unesko, 7, Place de Fontenoy, F-75700 Paris, Francio.

Belartaj Konkursoj de UEA en 1990

UEA denove alvokas ĉiujn verkemajn esperantistojn al partopreno en la Belartaj Konkursoj. Temas pri institucio, jam 40-jara, sen kiu ne eblas imagi la Esperanto-kulturon, precipe la literaturon. Tiu institucio neniel montras signojn de elĉerpigo: ankaŭ en la lastaj jaroj ĝi surscenigis novajn kreivajn talentojn. Ankaŭ ĉi-foje ni bonvenigas novulojn konfronti siajn verkojn kun tiuj de jam konataj aŭtoroj – jam ne malofte tiuj ĉi lastaj devis cedi antaŭ fortoj pli freŝaj.

Rajtas konkursi ĉiu esperantisto, kiu ne gajnis dum la tri antaŭaj jaroj la unuan premion en la branĉo, en kiu ŝi/li konkursas. Unu persono povas partopreni per maksimume tri verkoj en ĉiu literatura branĉo.

Poezio: Maksimuma longo de konkursaĵoj ne fiksita. Tri premioj.

Prozo: Maksimuma longo de konkursaĵoj 200 x 65 tajpospacoj. Tri premioj.

Teatraĵo: Sen maksimuma ludodaŭro. Tri premioj.

Eseo: Temo prefere ligita kun la internacia lingvo. Longo ĉ. 400 x 65 tajpospacoj. Premio Luigi Minnaja (unu).

Fotografio: Temo ligita kun Esperanto aŭ la temo de la 75-a UK: “Esperanto, evoluo, kultura diverseco”. Minimuma formato 13 x 18 cm. Nigra-blankaj aŭ koloraj. Tri premioj.

Kanto: Teksto kaj melodio, kiuj povas esti verkitaj de malsamaj aŭtoroj, estu novaj kaj nepublikigitaj. Premio An-okin (unu).

Infanlibro de la Jaro: Eldonejoj rajtas proponi infanlibrojn, ĉu originalajn ĉu tradukitajn, kiuj aperis en 1989. Unu premio.

Reguloj: La konkursaĵoj por poezio, prozo, teatraĵo, eseo kaj kanto estu senditaj en kvar ekzempleroj al la sekretario: s-ro Osmo Buller, Suksitie 4 B 15, SF-93400 Taivalkoski, Finnlando, kaj devas atingi lin plej

malfrue la 31-an de marto 1990. Por fotografio sufiĉas sendi unu ekzempleron de ĉiu konkursaĵo al la Centra Oficejo de UEA, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando, por alveni antaŭ la 1-a de julio 1990. Por la branĉo de infanlibroj la eldonejoj sendu po tri ekzemplerojn al la Centra Oficejo de UEA por alveni antaŭ la 31-a de marto 1990.

La konkursaĵoj devas porti klaran indikon pri la konkursa branĉo kaj (escepte de la infanlibroj) esti signitaj per pseŭdonimo. En aparta koverto estu indiko de tiu pseŭdonimo kun la vera nomo kaj adreso de la konkursanto. Se tion permesas la poŝtaj reguloj de la lando, oni aldonu po 5 internaciajn respondkuponon por ĉiu branĉo, en kiu oni konkursas.

Ne validas konkursaĵoj, kiuj jam aperis presforme. Ĉiu konkursanto konsentas, ke la rajto pri la unua presigo de premiita verko apartenas al UEA, kaj devigas sin ne publikigi ĝin aliloke, krom se UEA rifuzas la presigon. La kopirajto restas ĉe la aŭtoro, sed tiu konsentas cedi ĝin senpage okaze de eldono de antologio de la Belartaj Konkursoj, kondiĉe ke tiu aperu kun la aprobo de UEA.

La gajnintoj normale legas aŭ legigas la premiitajn verkojn en aparta kongresa aranĝo. Teatraĵoj povas esti luditaj aŭ legitaj, la kanto prefere prezentita de kantisto aŭ koruso. Oni okazigas ekspozicion de la premiitaj fotoj. Ĉiu premiito ricevas diplomon.

Premio: Unua premio 310 gld.; dua premio 217 gld.; tria premio 124 gld. Premio Luigi Minnaja ĉ. 300 gld. Premio An-okin 310 gld. Premio Nova Talento (por la plej bona konkursanto neniam premiita) 217 gld. plus enskribo de la nomo sur la pokalon Henry Harabagiu. Infanlibro de la Jaro 651 gld.

Detala regularo haveblas de la CO de UEA kontraŭ unu respondkuponon.

*Nun bazite en Singapuro, kie li ekbruligis veran movadan fajron,
Joachim Werdin daturigas siajn vizitojn al la landoj de sud-orienta Azio.*

Bona, sed malfacila tero en Tajlando

Ĉar en la Jarlibro mi trovis la adreson de la sola UEA-delegito en Tajlando, mi unue iris al li. Poste ni kunlaboris. Laŭ s-ro Marcel Perray: "La popolo scias nenion pri Esperanto, la radio kaj televido neniam parolas pri la internacia lingvo. De tempo al tempo artikoloj pri Esperanto aperas en gazetoj, precipe anglalingvaj." Responde venas po 20 ĝis 80 leteroj, el kies skribintoj nur unu triono deziras lerni serioze. Entute pluraj dekoj da lernintoj loĝas dise tra la lando; pluraj el ili povas kompreni la lingvon, precipe skribitan, sed ili ne aktivigas aŭ kunlaboras.

S-ro Perray instruas per koresponda kurso. Tamen la tajoj estas en malfavora situacio, ĉar ne ekzistas lernolibro kaj vortaro en ilia lingvo: plej ofte ili devas lerni pere de la angla. Ĉi ties forto estas sentebla ĉie. Por ĉiu edukita persono scio de la angla estas unu el la plej gravaj rimedoj por bona profesia kariero. Oni kredas ĝin la sola internacia kaj ĉie parolata lingvo. La tajoj do havas neniun ideon pri la monda lingva problemo, kaj kompreneble sentas neniun bezonon je Esperanto.

Farinte kelkajn prelegojn kaj interparolinte kun kelkaj homoj, mi tamen konstatis ke Tajlando estas loko donanta fruktojn al Esperanto-aktivulo. Laŭ s-ro Perray: "Antaŭe kiam oni aŭdis pri Esperanto oni ridis; nun oni petas informojn kaj eĉ lern-materialojn." Li esperas en la venonta jaro aperigi vortaron kaj lernolibron en la taja. En Bankoko mi organizis du intensajn kursojn, helpate de la Bahaa Centro. Kvankam ĉ. 60 personoj komencis la kurson, nur 17 ricevis atestilon; la 10an de septembro ili fondis la Esperantistan Klubon de Bangkok. De tiam ili kunvenas unufoje semajne. Bonvolu kuraĝigi kaj helpi ilin: s-ro Pho Thamkhajadpaikun, 42 Areesamphan 5, Rama 6 Rd., Phyathai, Bangkok 10400.

Resume mi povas diri ke Tajlando estas bona, kvankam ne tre facila kampo por semi Esperanton. Necesas precipe, ke oni iru tien kaj laboru. Mi esperas ke inter la finintoj de la kurso troviĝas la bezonataj aĝemuloj.


komencis la kurson — sed poste, dum la lernado, ili rezignis, opiniante ke lerni tiun lingvon, kiun oni ne povas praktike uzi, estas perdo de tempo kompare kun la angla, franca kaj rusa lingvoj.

"Esperanton oni devas ligi kun ekonomia agado," diris al mi la kluba prezidanto, d-ro Lê Nhiêm. Li tuj proponis konkretan entreprenon: al la haveno apartenas hotelo "Esperanto", kies vicdirektoro li estas; ĝi celas precipe esperantistan turismon kaj por-Esperantan agadon. Jen konkreta bazo por investo, en la formo de mono aŭ ekipaĵoj, kiu laŭ la vjetnamaj leĝoj povus esti tute loga kaj profitdona. Por pli da detaloj skribu al d-ro Lê Nhiêm, 3 Nguyen Tât Thành, Quân 4, Ho Chi Minh.

Ankaŭ aliloke en Vjetnamio oni parolas kaj pensas serioze pri la evoluigo de Esperanta turismo. Dum mi estis en Hanojo, la direktoro de Hanoja Vojaĝa Asocio partoprenis Foiron de E-Turismo en Bidgoŝto, Pollando. Post nelonga interparolo kun la vicdirektoro mi konvinkiĝis pri ilia volo kunlabori kun Esperantaj vojaĝorganizaĵoj; li kaj liaj oficistinoj lernas Esperanton. Alian konkretan proponon faris al mi Societo Azipacifiko, iniciatita de Vjetnama Pacdefenda Esperantista Asocio kaj konsistanta el sciencistoj, teknikistoj kaj aliaj. Ĝia celo estas profite kunlabori kun diversaj eksterlandaj organizaĵoj en iu ajn fako. Skribu al Societo Azipacifiko, 2 Dưòng Láng, Q. Đống Đa, Hà Nội.

Mian viziton al Hanojo bonege organizis la sekretario de VPEA, s-ro Dang Đình Dàm. Mi renkontis ĉ. 40-personan klubon ĉe la Sovetia-Vjetnamia Palaco de Amikeco. Ĉe la Fremdlingva Eldonejo laboras pli malgranda sed sperta grupo, kiu aperigis la mirindan nombron de ĉ. 100 titoloj en Esperanto dum la pasintaj tridek jaroj (pliaj kvar aperos en la proksima estonteco). Tiuj homoj aparte petas la sendon de Esperantaj gazetoj, kontraŭ kiuj vi povos ricevi librojn interŝanĝe; ili ankaŭ serĉas pres-paperon kaj -materialojn. Jen la adreso: Hanoja Fremdlingva Eldonejo, 46 Tran Hung Dao, Hanoi.

Werdin (maldekstre) diskutigas la agadon en Ho Chi Minh-urbo, septembron 1989.



En Vjetnamio regas soifo al la praktikado

La eksterlanda esperantisto en Vjetnamio estas raraĵo pri kiu oni revas. Jam en la flughaveno de la urbo Ho Chi Minh mi estis akceptita kore kaj ĝoje, kaj dum la tuta, dusemajna restado tie kaj en Hanojo mi renkontis dekojn da gemovadanoj. Oni povas konstati ke, kompare kun aliaj landoj, en Vjetnamio multe da homoj aŭdis pri Esperanto kaj eĉ miloj lernis ĝin.

Ĉe la laborista kulturdomo en Ho Chi Minh-urbo ekzistas klubo, en kiu membras kelkaj dekoj da esperantistoj kaj apogantoj. (La apogantoj, ofte influhavaj personoj, estas multe pli nombraj ol la parolantoj de la lingvo: tio estas unu el la karakterizaj trajtoj de la vjetnama movado.) Al mia prelego venis ĉ. 70 homoj, kaj ankaŭ multe

Se paroli pri eldonaĵoj, delonge ne ekzistas la organo de VPEA, sed la esperantistoj en Ho Chi Minh-urbo atingis tion, ke la monata revuo *Vjetnamio* povos aperi jam en la venonta jaro en Esperanto kiel sia naŭa lingvo. Tiun paŝon kuraĝigos abonpetoj: mendu (ne kostos multe) ĉe d-ro Lê Nhiêm, supre.

Mi konstatis ke la agado en Vjetnamio koncentriĝas en Ho Chi Minh kaj en Hanojo. Bedaŭrinde la movadoj en la du urboj ne kunlaboras kaj nur sporade informas unu la alian pri la agado (supozeble la distanco kaj altegaj vojaĝkostoj kaŭzas tion). Estas pluraj, tamen ne multaj bonaj parolantoj de la lingvo. Tamen ekzistas bonaj eblecoj por investo aŭ komerco, kaj por turismo, sole aŭ grupe. La vjetnamaj esperantistoj akceptos vin kore kaj zorgos pri vi bone, kvazaŭ vi estus ilia familiano.

Bonvolu noti: Skribante al Vjetnamio nepre aldonu du irkojn, se tio eblas, ĉar poŝtmarko tie kostas 15-onon de la meza monata salajro.

Joachim Werdin

JUNULARO

Impresoj el Bulgario (2)

Bulgario – nigra makulo sur mia persona mondmapo ĝi estis ĝis nun. Des pli ĝoje mi akceptis inviton al la Internacia Junulara Seminario de Bulgara Esperanto-Junularo, okazonta en la Internacia Esperanto-Kursejo (IEK) en Pisanica, 6-10 septembro 1989.

Verŝajne pro diversaj oficialaj informiloj, mi ligis al la bulgara Esperanto-movado atendojn de multenombra, tre aktiva kaj vigla forto, iom ankaŭ influanta la socian vivon en Bulgario. Tamen miaj unuaj malkovroj dum la bedaŭrinde nur naŭtaga vizito estis iom seniluziigaj: En Sofio la asocia laboro estas ege ĝenata per la fakto ke diversaj oficejoj malgrandaj situas dise en la tuta urbo (ekz. la Esperanto-Muzeo – pli bone: biblioteko – troviĝas rande de la urbo en loĝeja blokkonstruaĵo, kaj mi dubas ke iam iu ajn trovas la vojon tien). Tiu ĉi situacio tamen espereble jam baldaŭ ŝanĝiĝos per la konstruo de nova domo.

En Pisanica la seminario havis la vere allogan ĉeftemon “La humanismaj sciencoj kontraŭ la teknikaj” – tamen, fakte neniuj parolis pri ĝi! Jam multe pli interesa ol la vastaj paroloj pri la ebloj kaj necesaj estontaj pozicioj de Esperanto – almenaŭ por mi – estis prelego de reprezentanto de nacia junulara organizo, kiu parolis pri la rolo de la junularo kaj necesaj estontaj renovigoj. Kiel nuntempe diversloke en socialismaj landoj, aŭdeblis ke la regantaj fortoj devas konfesi erarojn faritajn dum la lastaj jardekoj, ke nun akra memkritiko kaj vasta diskutado necesas. (Cetere: ankaŭ la bulgara Esperanto-movado ŝajne suferas troan atendumon de ĝiaj aktivuloj kaj lamigan burokratismon, malfavore al spontaneco, libera aktivado kaj efektiveco – kvankam ĝuste ekz. la aspekto de ŝanĝita *Bulgara esperantisto* kaj de la laste eldonitaj libroj dokumentas atingon de relative alta nivelo). La nedistra programo ampleksis krome ankoraŭ kelkajn mallongajn kontribuojn, dum la distra, vespera programo vidis diskotekumadon, internacian vespereton, solenaĵon kune kun la vilaĝanoj okaze de nacia festotago, ĝismatenan komunan dancadon, muzikadon kaj kantadon... La IEK vere povas esti hejmo por Esperanto kaj ties amikoj, des pli pro sia belega, ripoziga montara ĉirkaŭaĵo.

Entute miaj impresoj estis similaj al tiuj kolektitaj jam dum vizitoj en aliaj orienteŭropaj landoj: Unuarigarde por mi okcidentulo ĉie videblas la pli malalta materia nivelo. Duarigarde tre agrable spertiĝas la ĉarmo, varmkoreco, interesiteco kaj

gastamo de la homoj, kune kun vivoritmo kiu ŝajnas ĝenerale pli kongrua al la bezonoj de la homa animo. Sed la distinga linio inter oriento kaj okcidento nur tre malklare estas trovebla. Materialisma vivmaniero ĉien enpenetras. Ĝenerale necesas konsciiĝo pri la veraj utiloj kaj pli harmonia uzado de la homkapabloj. Rimedo antaŭ ĉio por atingi tion estas miaopinie interŝanĝo kaj reciproka fekundiĝo.

Bulgara Esperanto-Asocio jam provas fari tiudirektajn paŝojn. Estas fondita kaj jam ekfunkciis firmao “Esperanto-turist”, kiu organizos en- kaj eksterlandan turismon por esperantistoj kaj amikoj de Esperanto. Krome Bulgara Esperanto-Junularo serĉas eblojn por kontraktoj pri “persontaga interŝanĝo” kun okcidentaj Esperanto-junularoj. Servi por tiaspecaj interŝanĝoj eble ja jam povos jenaj sekvontjaraj aranĝoj en Bulgario: feriado en Primorsko (apud Burgas ĉe Nigra Maro) fine de junio, diversaj laborbrigadoj en somero, la sekvonta internacia seminario de BEJ en Pisanica iam en aŭtuno, tradicia studenta festo en Pisanica 7-9 decembro 1990, trisemajnaj kvargradaj Esperanto-kursoj en Pisanica 1-20 julio kaj 1-20 aŭgusto 1990 (kiuj kunigos ĉ. 200 partoprenantojn). Kaj ĉiam eblas privataj turistaj vojaĝoj.

Bernhard Westerhoff (FR Germanio)

KULTURO

Ĉu ni ŝparas nian historion?

En multaj anguloj de la esperantistaro troviĝas kolektoj da dokumentoj el nia historio. Subite okazas io, la senpaga kelo aŭ ĉambro malaperas, kaj jen venas la demando ĉu indas pagi por ŝpari tiujn dokumentojn.

Unu el la silentaj apogiloj de la sveda Esperanto-movado, Bertil Åkerberg, mortis antaŭ du monatoj. Li havis hejme ĉe si la kolektojn postlasitajn de pluraj eminentaj svedaj esperantistoj (Nylén, Malmgren), pro tio ke ne ekzistis arkivloko kiam tiuj personoj mortis. Ni ne posedas pli da loko nun. Hieraŭ ni transportigis tiujn kartonajn skatolojn al malgranda ĉambro kiu jam antaŭe estis plena je arkivo de libroj kaj gazetoj. Nun ankaŭ la planko de la ĉambro estas plena, ĝis alteco de mia kapo.

Certe multaj rekonas la problemon. Je iu punkto oni devas kribri la materialojn. Lokaj esperantistoj proponas sin por helpi, eĉ por fari laborgrupeton. Sed laŭ kiuj principoj ili ordigu?

Libroj kiuj jam troviĝas en la biblioteko estas vendeblaj. Pri gazetoj estas jam pli malfacile, ĉar ili ofte estas neordigitaj kaj la laboro ordigi kaj eventuale vendi duoblaĵojn estas grandega. Ne ĉiuj gazetoj estas ŝparindaj, sed kelkfoje la plej ĉifitaj mizeraj ekzempleroj povas esti raraĵoj. Kiuj scias? Cirkuleroj de UEA abundas, kaj supozeble troviĝas en arkivo ĉe la Centra Oficejo. Sed kio pri cirkuleroj de faka asocio, eventuale pli malordaj ol la gazetoj?


Personaj leteroj kompreneble estas unikaj, speciale se la skribinto aŭ ricevinto estis gvida esperantisto. Ekzistas ankaŭ personaj leteroj inter tute ordinaraj esperantistoj, zorge ŝparitaj de filo kaj poste nepo kaj poste filino de bofratino de nepo, sed ne ordigitaj kaj sen grava enhavo. Fotoj estas eĉ pli malfacile prijuĝeblaj.

Urĝe necesas ke tiuj esperantistoj, kiuj havas spertojn pri arkivo, provu transdoni tiujn spertojn en formo, kiu estas komprenebla al tiu grupeto da helpemaj lokaj esperantistoj sen profunda kono pri la historio de Esperanto. Alie la stokejoj pleniĝas per rubaĵoj dum la valoraĵoj perdiĝas.

Ulla Luin (Svedio)

Ĉu perestrojko pereigos la unuecon de sovetiaj esperantistoj?

Dum mia 9-monata stud- kaj esplorrestado en Sovetunio mi ne nur partoprenis la sovetian Esperanto-movadon, sed konatiĝis kun ĝiaj multfacetaj nuancoj, aktualaj problemoj, (mal)ebloj kaj perspektivoj. Mi estis invitita al Esperanto-aranĝoj de Moskvo ĝis Odeso, de Litovio ĝis Siberio, kio ebligis al mi propraokule ekkoni la movadon kaj ties anojn. Sovetunio mi forlasis kunportante antaŭ ĉio du ĉefajn impresojn: analoge al multaj nesolvitaj problemoj de la sovetia vivo, la reforma kaj liberaliga procezo sub glasnosto kaj perestrojko komplikis kaj konfuzis ankaŭ la situacion de la sovetia Esperanto-movado. Due, ĝiaj anoj, aliĝante al la gorbaĉova rekonstruo, enkondukis novan periodon de movada multformeco kun tendenco al skismo. La dua impresio estas certe tre pensiga.



Skeptika rigardo en Odesa korto:

En Sovetunio venis nova vento... sed kie la rondo familia?

La centrisma kaj totalisma regomaniero de Asocio de Sovetiaj Esperantistoj (ASE, 1979-1989) neniam kapablis garantii harmonian kaj tolereman unuecon de la sovetia esperantistaro en formo de (kon)federacio. ASE ĉiam kontraŭstaris ĉian individuan organizemon, kiu ne povus esti kontrolata fare de la (moskva!) centro. Ĝi toleris ekzemple nur centre kontroleblajn respublikajn ASE-filiojn. Tiel ASE kiel fuŝnaskaĵo de la stagna periodo ne havis alian kapablon ol burokratiigi kaj degenerigi Esperanton en Sovetunio. Kvankam la aliĝo de ASE al UEA estis planata dum jaroj, ĝi neniam realiĝis. La preferon oni donis al la "fratiĝo" kun Mondpaca Esperantista Movado (MEM), malkovrante en UEA kvazaŭ kontraŭsovetian agenton.

La ribela febro en la sovetia Esperanto-movado eksplodis en oktobro 1988 per la refondo de Esperanto-Asocio de Estonio. Ĝia viruso tuj trafis la baltajn najbarojn: decembre estis restarigita la antaŭmilite likvidita Litova Esperanto-Asocio, dum sammonate la latvoj fondis sian propran Latvian Esperanto-Asocion. Per tiuj tri kuraĝaj paŝoj en Tallinn, Kaunas kaj Riga

estis samtempe malglorie entombigitaj la tri baltaj filioj de Asocio de Sovetiaj Esperantistoj. La ostoj de la *mano el Moskvo* estis rompigitaj. La litovoj jam sukcesis leĝe registri sian LEA-n kiel oficiale agnoskitan asocion en Litovio, kaj en Estonio kaj Latvio jam aperas Esperanto-bultenoj. Kiel memstaraj, sendependaj asocioj la tri organizaĵoj agas ekster la tutsovetia kadro. Tamen, estonta kunlaboro ne estas ekskludebla: "Estonte principe eblas aliĝo al ASE/SEU laŭ federaciaj aŭ konfederaciaj kondiĉoj, se estos senco kaj utilo tion fari, se finfine ASE/SEU komencos normale labori," signalis Povilas Jegorovas, unua vicprezidanto de Litova Esperanto-Asocio, ankoraŭ antaŭ la malfondo de ASE en januaro 1989.

La anticipa forkuro de la tri baltaj Esperanto-movadoj kaj la maltrankvileco kaj senpacieneco ĉe la cetera sovetia movado, devigis ASE finfine lanĉi la du jarojn prokrastitan tutsovetian konferencon. Ekzakte 10 jarojn la asocio ekzistis kiel kolektiva membro de Societo de Amikeco kaj Kulturligoj kun Eksterlando (SSOD) sen esti alportinta grandan utilon al Esperanto en Sovetunio. La maltrafitan eblon fariĝi Landa Asocio de UEA neniam forgesis ĝiaj demokratiaj anoj. Ilia *venĝo* sekvis en januaro 1989. [Vidu la anoncon pri la refondo de Sovetrespublikara Esperantista Unio sur p. 22 de la februara n-ro, kaj la raporton sur p. 81-82 en majo. —red.]

La bruaj debatoj dum la tritaga ASE/SEU-konferenco montris la nesuperrigardeblan amason de problemoj, kies solvado dum jaroj estis prokrastita. Kian organizstrukturon havu SEU? Multege da tempo perdis la delegitoj pro la diskuto pri federacieco aŭ konfederacieco de SEU, sen trovi la definitivan respondon. Ĉu SEU estu memstara aŭ ĉu ĝi funkcii kadre de aŭ sub iu ŝtata instanco? Kvankam la plimulto de la delegitoj subtenis organizon sendependecon, la dilemo estis kompromise konkludita: ne aliĝi al, sed kunlabori kun konkretaj instancoj, emfazas la Konferenca Decidaro. La SEU-prezidio kun ties prezidanto V. Samodaj esperas, ke baldaŭ dekretota nova leĝo pri organizaĵoj en la lando reguligos la definitivan statuson de SEU. Daŭre ĝenaj estas la burokratio kun la disponigo de la papero por aperigi periodaĵojn, la manko de kunvenoj kaj monrimedoj. Kaj la granda obstaklo de la transpagaj problemoj kaj aboneblo de eksterlandaj gazetoj ankoraŭ ne povis esti solvita plenkontente. Nesufiĉaj kontaktoj kun la ekstera mondo izolis la esperantistojn en Sovetunio disde la cetera Esperanto-movado.

Fakte, la pli granda ag- kaj decid-libereco en la nekutime malferma politika etoso disigis la sovetiajn esperantistojn. Ilia senkompromisa diversopinieco surscenejigis *konkurencajn organizaĵojn*. Estas interese observi, ke ankaŭ en iliaj vicoj, glasnosto (la teorio) estas pli potenca ol perestrojko (la realigo de la teorio[j]). Ekzemple, grupeto da *larĝvidaj* homoj (kiel ili mem taksas sin), kritikante la *mallarĝvidan* SEU-decidon agi ekster la ŝtata ligo, antaŭvidis senesperan lukton por la SEU-registriĝo. En majo 27 Esperanto-klubo el 4 respublikoj fondis TUEK, *Tutsovetian Unuiĝon de Esperanto-Klubo ĉe VNMC* (VNMC estas eksperimenta sciencmetodika centro ĉe Kulturministerio de Sovetunio). Ŝajnas, ke la fondintoj de TUEK ankaŭ ne volas tute preteratenti SSOD-on, kies helpo interalie por faciligi eksterlandajn vojaĝojn estas utila.

La politikecan ludon partoprenas ne nur plenkreskuloj. Diverĝantaj starpunktoj ĉe la junuloj skismigas ankaŭ ilin. Fine de decembro 1988 venis la decido revigligi *Sovetian Esperantistan Junularan Movadon (SEJM-2)*. SEJM-1 pereis en 1979, devante kontentiĝi je Junulara Komisiono de ASE. Okaze de tendaro en 1988 la junaj esperantistoj konstatis, ke la tempo estas matura por reorganiziĝi pli efike. Tiu reorganiziĝo okazis en Siberio, 4000 kilometrojn for de Moskvo, kie grupo de junuloj konstruas *Junularan Esperanto-Centron* (urbo Taŝtagol,



“Vi tenas nun en viaj manoj la provnumeron en Esperanto de «Moskvaj novaĵoj» — ĵurnalo tre populara en Soveta Unio kaj ekster ĝiaj limoj.... Tiu ĉi provnumero aperis dank’ al tiu naŭdeko da leteroj (el 18 landoj), kiuj pledis por aperigo de «MN» en Esperanto... [Ĝi] estas plene kompilita el materialoj de la ĉiusemajna ĵurnalo «MN», krom la internaj ok paĝoj (E-movada kaj literatura suplementoj).... **La regula ekzisto de la eldonaĵo en Esperanto, ĝia ofteco kaj prezo dependas de viaj reeĥoj Ni atendas.**”

Adreso de la redakcio: Gorki str. 16/2, Moskvo, USSR.

distrikto de Kemerovo). Poste, januare en Moskvo okaze de la SEU-konferenco, oni ne volis rezigni pri Junulara Komisiono de SEU. Ĉu hazarde, ĉu malhazarde, la motoro de SEJM estas samtempe prezidanto de JK de SEU (A. Ananjin). Sed denove ne mankas minoritato, al kiu plaĉas nek SEJM nek JK de SEU. Gejunuloj apartenantaj al tiu *frakcio* naskis *Fondaĵon de Esperantistaj Junularaj Aranĝoj (FEJA)*. Tiu jure agnoskita kreaĵo komprenas sin malpli asocio, pli produktanta entrepreno. [Unu el ĝiaj fondintoj, V. Seguru, estis intervjuita en la revuo pasintjare, p. 165. —red.]

En Baltio, kun la fondo de baltlandaj asocioj instaliĝis ankaŭ koncernaj junularaj movadoj. Dum en Estonio funkcias Junulara Komisiono de EAE, la litovaj gejunuloj preferas posedi memstaran organizaĵon: ĝi nomiĝas LEJL: Litova Esperantista Junulara Ligo. Oni povas atendi iliajn aliĝpetojn al TEJO. Kaj en aliaj respublikoj? La skeptiko montrita al tutsovetia federeco preferigas ankaŭ aliajn respublikojn posedi proprajn organizaĵojn. En marto fondiĝis en Minsk Belorusia Esperantista Unuiĝo kaj en majo aperis en Poltavo Ukrainia Esperanto-Asocio kaj reage al ĝi — aŭdu kaj miru — Ukrainia Respublika Esperantista Unuiĝo. La duecon en Ukrainio klarigas la malkonkordo inter du *rivalaj grupiĝoj*. Dum la unua asocio sentas sin allogata de la respublika sindikato, la dua serĉas sian subtenon ĉe la kulturministerio. Restas Armenio, Kartvelio kaj Uzbekio kun SEU-filioj, sed ankaŭ el tiuj regionoj registriĝis signoj de libereco...

La emancipiĝo for de centra ligiteco estas observebla cetere ne nur sur respublika nivelo. En unuopaj urboj lastatempe

KURE TRA SOVETIO (vidu la mapon sur p. 188)

Tutlande: Sovetrespublikara Esperantista Unio, restarigita pasintan januaron, aliĝis al UEA en la Brajtona UK. Ni rekomendas kontakti ĝin pri ĉiuj tutsovetiaj aferoj; aliflanke, pri regionaj kontaktoj aŭ agado ofte eblas turni sin rekte al la koncernaj homoj aŭ asocioj. Leterojn al SEU peras E-klubo “Leo Tolstoj”, ul. Volĥonka 13, SU-117820 Moskvo. Eblas ankaŭ telefoni al ĝiaj vicprezidantoj V. Samodaj (+7095 313 20 75), A. Gonĉarov (+7095 201 51 21) kaj S. Kuznecov (+7095 299 28 98, labore 291 34 48).

La prezidanto de Sovetia Esperantista Junulara Movado kaj de la Junulara Komisiono de SEU estas Andrej Ananjin, Junulara Esperanto-Centro, Taŝtagol, SU-652970 Kemerowska obl.

Azerbajĝano: Februare en la ĉefurbo Baku ekaperis plenkolora dulingva gazeto, *Sovetia esperantisto*. Ĝia redaktoro Ŝaik B. Mamedov sukcesis enplekti la E-klubon “Ĥazar”, E-kooperativon “Luĉ” kaj la Azerbajĝanan Asocion de Ĵurnalistoj en la produktadon. Li aparte deziras stimuli komercajn interŝanĝojn per la revuo. Adreso: Sovetia esperantisto, pk. 3, SU-370146 Baku 146 (tel. 66-89-31).

Belorusio: En marto estis fondita en Minsk Belorusia Esperantista Unuiĝo. Ĝi

eldonas la trilingvan gazeton *Belorusaj novaĵoj*. Ekzistas minimume naŭ kluboj en la respubliko, el kiuj tri en Minsk, kiu cetere gastigis la 2-an Internacian Sovetian Junularan Tendaron en aprilo (vd. *Esperanto* 1989, p.82-3). Adreso: BEU-prezidanto V.F. Matjuŝkov, Pk. 33, SU-220001 Minsk.

Estonio: Kune kun la antaŭa Esperanto-Asocio de Estonio reaperis ĝia organo *Informoj de EAE*, presate dukolore kaj plene en Esperanto. Fondiĝis ĉe Radio Tallinn 10-minuta Esperanta elsendo, kiu aŭskulteblas dufoje (ĵaŭde kaj dimanĉe) en la unua kaj tria semajnoj de ĉiu monato (vidu la radio-rubrikon en la lasta numero por frekvencoj kaj adreso). Adreso de la asocio: EAE, Olevimägi 12/14, SU-200101 Tallinn.

Latvio: Latvia Esperanto-Asocio aliĝis al UEA en la Brajtona kongreso. Ĝi aperigas la bultenon *Latvia esperantisto*. Adreso: LEA, Lenina 84-5, SU-226001 Riga.

Litovio: Litova Esperanto-Asocio, ankaŭ aliĝinta al UEA, sukcesis leĝe registriĝi kiel litova organizaĵo. En Litovio ekzistas 36 E-kluboj; oni pripensas relanĉi la iaman organon *Litova stelo*. En Kaunas sukcesis la kampanjo por havigi la domon de Aleksandro

Zilbernik al la Asocio (vd. *Esperanto* 1988, p.124), interalie pro la subteno de la internacia esperantistaro: la urbaj kaj respublikaj instancoj ricevis leterojn el deko da landoj. Nun oni planas en la trietaĝa domo loki la LEA-oficejon, bibliotekon, arkivon kaj muzeon, klubejon kaj instruan centron. Ĉiujn ripar-kostojn pagos la urbo Kaunas mem. Samloke okazis en aŭgusto la 26-a Baltia Esperantista Tendaro. Ĉe Radio Vilnius inaŭguriĝis E-elsendo en aprilo 1989. kvar minutojn lunde kaj merkrede (vd. radio-rubrikon). Adreso de la asocio: LEA, Pk. 167, SU-233000 Kaunas. Fondiĝis ankaŭ memstara junulara asocio, kun propra organo *Junulara voĉo*: Litovia Esperantista Junulara Ligo, Pk. 193, SU-233000 Kaunas.

Rusio: En tiu ĉi grandega respubliko la movado funkcias pli je regiona nivelo ol kiel unu tuto. Elstara estas la evoluo en Uralo, kie pluraj viglaj kluboj (Perm, Sverdlovsk, Ufa, Tjumen... ekzistas entute dudeko) kunigas la fortojn en Urala Esperanto-Societo. Ankaŭ en la suda regiono de la riveroj Volgo kaj Don okazas kunlaboro inter deko da kluboj. La delegitoj en la Jarlibro donas ian spuron pri aliaj centroj de Esperanto-agado.

anoncis sin novaj kaj renovigitaj organizaĵoj. Ili rifuzas entute enmiksiĝon de ekstere kaj volas mem decidi al kiu tendenco aparteni kaj kun kiu fluo kunlabori. Lige kun tiu evoluo naskiĝas Esperanto-periodaĵoj: en Baku, kie la Esperanto-kooperativo "Luĉ", lanĉante la inform-reklamilon *Sovetia esperantisto* trovis partneron en Asocio de Azerbajĝanaj Ĵurnalistoj; en Uljanovsk/Sevastopol, kie kelkaj intelektuloj sub la nomo "Unuiĝo por Novtipa Kulturo" redaktas la revuon *Survoje*; en Uralo kaj Siberio, kie malnovaj periodaĵoj ricevas novajn impulsojn (*Sezonoj* en Sverdlovsk, *Ekzakte* en Tjumen; *Aktuale* en Tomsk, *Eksciu ke...* en Taŝtagol).

Fine, kelkaj statistikaj ciferoj (publikigitaj en 1988 de *Informbulteno de ASE*) donu konkretan bildon pri la nombro de la sovetianoj. Laŭ tiuj indikoj, en 1987 en 12 respublikoj ekzistis 116 kluboj kun 5588 membroj. Pli junaj ol 35 jaroj estas 62%, membroj de la ŝtata junulara asocio Komsomolo estas 39% kaj anoj de la komunisma partio estas nur 9%. La nombro de kluboj kaj ties anoj intertempe certe kreskis: sole en Litovio nuntempe funkcias 36 societoj.

Restas konkludi, ke malgraŭ florado, Esperanto en Sovetunio ĉiukaze troviĝas en organiza krizo. Eliri ĝin estas la strebado de la sovetiaj esperantistoj. Kelkaj gvidaj aktivuloj montras sin optimismaj. Laŭ ili kelkajn jarojn post la ŝtormo regos trankvilo. Ili estas konvinkitaj, ke glasnosto kaj perestrojko ne plu estas renverseblaj. Kune kun la reformoj devige alvenos ankaŭ novaj leĝoj, kiuj definitivigos la statuson de Esperanto en la lando de la 100 popoloj. Sed ĝis tiam la esperantistoj ankoraŭ esperas...

Andy E. Künzli (Svislando)

INTERVJUO KUN SERGEJ KUZNECOV

La sovetia movado finfine vere ekvivas

Dum oktobro 1989 restadis en la Centra Oficejo d-ro Sergej Kuznecov, unu el la vicprezidantoj de Sovetrespublikara Esperantista Unio. La jam famiĝanta rusa interlingvisto estas surprize juna homo, alta, fortika, kiu elradias energion. La oficistoj baldaŭ al kutimiĝis al fona murmuro de rapidaj telefonaj interparoloj en Esperanto, la rusa, la angla, la dana kaj eĉ – foje – en Interlingua. Apud komputila terminalo rapide stakiĝis lastatempaj prilingvaj verkoj. La Biblioteko Hodler spertis nekutime kompletan trakribon. Tamen eblis sidigi ĉi tiun homan uraganon en seĝo dum du horoj por aŭdi lian perspektivon pri la sovetia movado. Dua parto de la intervjuo, pri interlingvistiko, aperos en la decembra numero.

MF: Andy Künzli pentras en sia artikolo sufiĉe ĥaosan bildon de la sovetia movado. Ĉu tio akordas kun via propra impresoj?

SK: Jes, pli-malpli. Tamen mi evitu la nomon kaoso; tutsimple nun estas transira periodo por Esperanto en Sovetunio. Aperas plej diversaj fenomenoj, pozitivaj kaj negativaj, tuŝantaj ĉiujn aspektojn. En la tuta socio okazas novaj tendencoj – lingvaj, literaturaj, politikaj, ideologiaj – kaj la Esperanto-movado spegulas tion. Mi nomus ties nun plej gravan trajton *plurvojeco*.

Moskvo meritas apartan mencion. Kvin kluboj funkcias en la sovetia ĉefurbo, inter kiuj la plej amasa kaj vigla estas la klubo "Leo Tolstoj", ul. Volĥonka 13, SU-117820 Moskvo. La E-kooperativo "Kopso" okupiĝas jam de unu kaj duona jaroj pri la tutrusia koresponda instruado de Esperanto kaj la perado de eksterlandaj korespondantoj, reklamante siajn servojn gazete kaj televide: Birjulevskaja ul. 53-1, SU-115372 Moskvo. En la ĉefurba regiono la junularajn klubojn kunigas Moskva Asocio de Junaj Esperantistoj, str. Timirjazevskaja 34-2-61, SU-125422 Moskvo. La plej granda sovetia fremdlingva eldonejo, Progres, funkciigas Esperantan sekcion kiu jam produktis la unuajn titolojn: Zubovskij bul. 17, SU-119847 Moskvo.

Taĝikio: Bonaj rilatoj inter la esperantistoj kaj la Geologia Instituto de la respublika Akademio de Sciencoj rezultigis sesan numeron de *Geologio internacia* en 1987 (kiun vendas la Libro-servo: 9,00 gld.). Pri postaj evoluoj ni ne aŭdis, sed jen la adreso de la ĉefurba klubo: Klubo "Esperanto", pr. Profsojuzov 43, SU-734043 Duŝanbe.

Ukrainio: La pli granda el la du respublikaj organizaĵoj estas Ukrainia Esperanto-Asocio, fondita pasintan

majon en Poltava, kun ligoj al la respublika sindikato kaj al SEU. Adreso: UkrEA, Pk. 165, SU-252001 Kiev 1. Grupo kiu preferas malpli tradician strukturon, kaj rilatas kadre de la kulturministerio kun la Ukraina Sciencometodika Centro, estas Ukraina Respublika Esperantista Unuiĝo, Pk. 539/1, SU-252200 Kiev. Ekzistas minimume 39 kluboj en la dua plej granda sovetia respubliko. Inter ili, tiu en Odeso festis en aprilo la centjariĝon de la loka organizita Esperanto-movado.

Uzbekio: Jam de unu jaro la plurlingva ilustrita gazeto *Sovetia uzbekio* aperigas

regulan E-rubrikon, prizorgatan de E. Perevertajlo (vd. *Esperanto* 1988, p.34): Pk. 140, SU-700000 Taŝkent. En Samarkand la E-klubo starigis Muzeon pri Paco, por kiu ĝi aktive varbas kontribuantojn: Pk. 76, SU-703000 Samarkand. Pri respublika organizaĵo ni ne aŭdis novaĵojn.

Aliaj respublikoj: Pri Armenio kaj Kartvelio ni scias nur, ke la movado ekzistas, kaj ke almenaŭ kelkaj kluboj kunlaboras kadre de Tutsovetia Unuiĝo de Esperanto-Kluboj kun aliaj kluboj en Rusio. Pri Kazaĥio, Kirgizio, Moldavio, Turkmenio ni scias nenion konkretan.

1991 en Moskvo: Rusa Sesio de Akademio Internacia de la Sciencoj San Marino

Temo: "Lingvo, kulturo, ekologio"

Kadre de la "Jaro de la Rusa Kulturo" deklarita de UN kaj Unesko, Moskva Scienca Esperanto-Klubo entreprenas organizi rusan AIS-sesion en decembro 1991. En tri sekcioj oni diskutos pri la kontribuo de la rusa kulturo al monda komunikado, nelaste pri ĝia rolo en la estiĝo de la internacilingva ideo, pri la kontribuo de la Esperanto-movado al la konservo kaj diskonigo de la rusa kulturo, kaj pri rusaj kaj Esperantaj perspektivoj al la konservo de la socia kaj natura medio.

Skribu al: Moskva Scienca Esperanto-Klubo, Sadovaja Kudrinskaja 18, SU-103001 Moskvo.

En tiu situacio, la lokaj kluboj estas provizore pli gravaj ol ia tutsovetia kunordiga laboro. Fortaj kluboj allogas eksterulojn; kie ili ekzistas, aparte se troviĝas kelkaj en iu loko, ili provizas firman bazon por konstruo. Sur tiu kluba fundamento baziĝas la regiona agado – ekzistas pluraj unuiĝoj en diversaj partoj de Sovetunio. Paralele ekzistas sufiĉe forta emo al fakaj unuiĝoj de individuoj, politike plurtendencaj – eĉ pri religiaj aferoj, kio neniam antaŭe okazis en Sovetunio.

Mi komprenas, ke tiu diverseco kaj la kreo de diversaj respublikaj kaj tutsovetiaj organizaĵoj povas produkti ĥaosan impreson. Tamen laŭ mi tio montras la veran vivon, la variecon de intereso en la movado, kaj kreas fakte allogan buntecon. La antaŭa ASE traktis Esperanton kiel aferon pure lingvan; nun ĝi transformiĝis en rimedon por la manifestiĝo de propraj intereso. Kaj tio faris ĝin unu el la lingvoj efektive uzataj en Sovetio. Estus granda impulso por Esperanto, se ĝi povus profiti el la novaj leĝoj donantaj sufiĉe da libereco al la portantoj de la minoritataj lingvoj.

MF: *Vi sonas optimisme. Ĉu tio etendiĝas ankaŭ al la estonteco de SEU kiel tutsovetia organizaĵo?*

SK: Antaŭe la kluba kaj regiona agado estis grave neglektata de ASE. Nun oni kvazaŭ regajnas la antaŭajn perdojn, kaj ĝuste pro tio la tutsovetia agado estas en la ombro. Sed mi kredas ke oni baldaŭ eksentos ĝian bezonon. Ekzemple, en multaj regionoj oni organizas tendarojn: nun ili foje okazas samtempe, tiel ke ambaŭ povas fiaski, se ne venas sufiĉe da homoj. Oni ankaŭ povas tutsovetie organizi reton de gastigantoj, aŭ peradon de libroj, aŭ instrusistemon kaj ekzamenojn – pri tio jam ekzistas tutsovetia komisiono, en kiu mi membras, kaj en la Balta tendaro ni organizis la ekzamenojn. Sed tutsovetia organizo havas sencon, nur por realigi tutsovetiajn funkciojn.

Pri la movado en Sovetio mi estas optimisma, tamen pri SEU – kiel ĝia vicprezidanto – mi dirus, ke ĝi devas perlabori sian prestiĝon. Se tion ĝi ne faros, aperos alia tutsovetia organizaĵo kiu prenos ĝian lokon. Mi tamen nun opinias ke SEU estas la plej fidinda kaj ŝancohava, ĝuste pro tio, ke ĝi heredis la aktivan parton de ASE kaj la komunan entuziasmon de la antaŭa SEU. Sed ĝi devos distanciĝi de la ideologia fono de tiu lasta, kiu estis certe stalinisma organizaĵo, kiel la socio ĉirkaŭ ĝi.

MF: *Vi menciis diversajn agadojn ene de Sovetunio. Ĉu vi ankaŭ vidas rolon por SEU kadre de la internaciaj organizaĵoj, kiel ekzemple UEA, al kiu ĝi ĵus aliĝis?*

SK: La nuna SEU estas samtempe tre forta kaj tre malforta. Forta pro granda alfluo de novaj homoj, kiuj – malsame kiel en okcidento – estas relative junaj kaj interesiĝas pri Esperanto ĝuste tiam, kiam ili estas en sia plej aktiva profesia periodo. Malforta en la senco, ke ĝi ne havas multajn financajn kaj teknikajn rimedojn, kiujn posedas la

okcidentaj organizaĵoj. Sekve oni povas kunigi la junan aktivecon de sovetiaj esperantistoj kaj diversajn praktikajn eblecojn de la okcidento por plifortigi la Esperanto-movadon ĝenerale. Tia internacia kunlaboro cetere bone kongruas kun la nuna sovetia politiko. Fakte neniam tutsovetia asocio organizis partoprenis en la tutmonda Esperanto-movado – la trabato venis ĉi-jare kun la aliĝo de SEU al UEA.


MF: *Kaj samtempe de la baltiaj organizaĵoj. Ĉu vi antaŭvidas malfacilaĵojn pro tio?*

SK: Mi ĉiam subtenis la restarigon de la historiaj Esperanto-organizaĵoj. Oni povas vidi ĝin kiel ian rekompencan de tio, kio okazis en la tridekaj, kvardekaj kaj postaj jaroj. Tial mi trovas tre bona la decidon akcepti ilin en UEA. Aliflanke, oni ne troigu la disiĝan tendencon. Ne estas bezonataj apartaj organizaĵoj en ĉiuj respublikoj aŭ por ĉiuj etnoj, kio povus konduki al cento da esperantistaj asocioj en Sovetunio. Mi kredas ke oni akceptu la principon de historia heredaĵo, kaj ne penu akceli la kreiĝon de pliaj etnaj organizaĵoj. Se estas bezono, ili kreiĝu; sed ili devus almenaŭ dum unu jardeko montri sian aktivecon, antaŭ ol ili prezentu sin apud tiuj organizaĵoj kun multjardeka tradicio.

MF: *Kiuj estas la plej gravaj taskoj, kiujn vi vidas antaŭ la sovetiaj organizaĵoj?*

SK: La nuna aktiveco limiĝas al tiu socia tavolo, kiun mi nomus la inteligencio. Gravega tasko estos plivastigi la partoprenon de laboristoj, agrikulturistoj ktp. Plia punkto: mi opinias, ke en ĉiuj landoj la Esperanto-movado spertas ian izolitecon. Tio estas paradokso, sed nun ŝajnas ke Esperanto estas internacia lingvo nur por esperantistoj. Oni devus denove peni ĉirkaŭigi la veran movadon per eksteraj fortoj, iuspeca "aŭreolo". Ĝuste nun en Sovetio tiu aŭreolo povus forte brili, ĉar multaj ekstermovadaj instancoj pri kulturo aŭ lingvoj interesiĝas pri Esperanto. Ekzemplo estas la nova ligo por evoluigo de la rusa kulturo. Per aranĝoj kiel la planata AIS-sesio en 1991 oni povas efike aŭreoli en tiaj sociaj movadoj.

(Daŭrigota en decembro. Intervjuis Mark Fettes.)



Miyamoto Masao (1913-1989)

La 12-an de julio 1989 post operacio en Ōsaka mortis Miyamoto Masao, membro de la Akademio de Esperanto kaj Honora Membro de UEA.

Miyamoto naskiĝis la 8-an de januaro 1913 en Wakayama. Lia formala eduko limiĝis al la elementa lernejo. Partopreninte jam kiel 16-jarulo en unuamaja demonstracio, li frue iĝis – laŭ sia propra formulo – “profesia revoluciulo”. En 1933 li estis arestita pro komunista aktivado. En la karcero li komencis lerni Esperanton, kiu ŝajnis al li esti proksime ligita kun komunismo. En 1935 Miyamoto liberiĝis, sed kaŝe daŭrigis sian politikan agadon.

Post la milito, kies finon li travivis kiel soldato en Okinawa, Miyamoto baldaŭ tute dediĉis sin al la Esperanto-movado. Li ekŝiĝis en 1950 el la Komunista Partio, sed plue donis zorgon preferon al la utiligo de Esperanto por difinitaj politikaj celoj, unuavice en la informado pri la sekvoj de la atombomb-eksplodoj kaj en la kampanjoj kontraŭ la usona interveno en Vjetnamio. Tradukoj el la japana literaturo konatigis lian nomon en eksterlando: *Rakontoj de Oogai*, *Japanaj malnovaj rakontoj*, *Japania Kvodlibeto*, *El la japana literaturo*, *Kvin virinoj de amoro* (de Ihara Saikaku), *El la vivo de Syunkin* (de Tanizaki Zyun'itiro), *Utaaro de Takuboku*, *Loulan* (de Inoue Yasusi), *Postmilita japana antologio* – por nomi nur kelkajn el la verkoj, kiujn li (foje kun aliaj) tradukis kaj kompilis. Miyamoto ankaŭ aperigis originalaĵojn, ekzemple *Pri arto kaj morto* (poste tradukita en la portugalan), *Invit' al japanesko*, kaj la duone aŭtobiografian *Naskitaj sur la ruino – Okinavo*. Prave, Vilmos Benczik skribis pri Miyamoto, ke “la nocio ‘esperanta kultura agado en Japanio’ plene kunfandiĝis kun lia nomo”.

La verkado de Miyamoto ĉiam paralelis aktivan organizan laboron. De 1951 ĝis 1973 li estis plentempa sekretario de Kansaja Ligo de Esperanto-Grupoj (KLEG), la centra organizaĵo de esperantistoj en la regiono de Ōsaka, Kōbe kaj Kioto. Post sia “emeritiĝo” li plue disponigis siajn fortojn al KLEG, kiu delonge havas renomon kiel unu el la ĉefaj kolonoj de la japana

Esperanto-movado. La praktika laboro siavice inspiris Miyamoto al verkado ankaŭ pri “movadologiaj” temoj. Notindas la eseoj *Sarkasme kaj entuziasme* (1979) kaj *Japanaj vintraj fabeloj* (1989) – kaj eble eĉ pli la brila *Historieto de la japana Esperanto-movado*, la biografio de la anarkiisto-esperantisto Ōsugi Sakae, la kolekto de verkoj de Hasegawa Teru (Verda Majo), kaj plej laste artikol-serioj pri la korea kaj ĉina movadoj. Kelkaj primovadaj verkoj de Miyamoto aperis ankaŭ en la japana lingvo.

Kiom la japanaj esperantistoj ŝuldas al Miyamoto Masao, ili mem plej bone konscias – se nur per la regula uzo de la 1100-paĝa *Vortaro Japano-Esperanta*, alia produkto de lia granda laboremo. La tutmonda movado tamen

unuavice memoris lin kiel unu el la malmultaj japanoj de lia generacio, kiuj regule flegis la kontakton kun esperantistoj ekster Japanio. (Krom al Ĉinio en 1985, li neniam vojaĝis eksterlanden.) Miyamoto ofte avertis, ke Esperanto restos fremda al azianoj kaj afrikanoj, se ĝiaj adeptoj en Eŭropo “nur per sia malprofunda eŭropa skalo volas ĉion mezuri”. Sed samtempe li admonis siajn samlandanojn, ke ankaŭ ili turnu siajn okulojn al la najbaraj landoj de Azio. Miyamoto per sia verkado atingis, ke inter eŭropaj esperantistoj kreskis la scio pri Japanio kaj ke la japanaj esperantistoj nun multe pli

aktive partoprenas en la internacia movado.

Esperanto estis por Miyamoto, kiu grandparte klerigis sin per ĝi, nekredeble serioza afero. Eĉ post kiam li perdis la kredon je pli bona, komunisma mondo, li fojfoje mokis pri la nova generacio de esperantistoj, kiuj anstataŭ partopreni politikajn kampanjojn preferas babili kaj amuziĝi. Sed preskaŭ samspire li kapablis je memironio (interalie pri siaj propraj politikaj zigzagoj), kiu mildigis la severan juĝon. Miyamoto ofte donis – tute ne-japaneske – la impreson, ke ceremoniaj ĝentilaĵoj estas por li perdo de tempo, kaj li havis la talenton senindulge polemiki. Sed ĉiu, kiu konatiĝis kun Miyamoto, tuj povis rimarki, ke li ne nur elradiis grandan personan ĉarmon, sed posedis ankaŭ profundan homamon.

Ulrich Lins



Inter mal- kaj mem-kontento

Dank' al amikoj mi ricevis kaj kun granda intereso legis la reagon de s-ro Aldo de'Giorgi al mia eseo "Survoje" [vd. *Esperanto* 1988, p. 130-132 kaj 1989, p. 72-73.] Evidentiĝas, ke nia elstara poeto estas ankaŭ bona humoristo, almenaŭ en tiu parto, kie li lamentas pri pesimismo, defetismo, bagatelismo k.s.

Efektive, kiam vi trovas ĉe vi nazkataron, nur de via persona karaktero dependas – kion vi faros morgaŭ: ĉu suicidos, ĉu serĉos rimedojn por sanigi vin? En mia 33-jara aĝo mi nepre preferas sanigadon. Se unu homo aŭ unu eseo kapablas bagateli la tutan movadon, ĉu tio ne signifas, ke: aŭ la aŭtoro de la eseo estas tro forta kaj malica, aŭ la movado tro malforta? Ĉar nek mi estas tiom giganta monstro, nek la movado jam suĉinfano, la plendoj pri bagatelo estas perfekte ridindaj.

Alian specon de humuraĵo ni trovas en la logiko de la estimata engaĝito. Pruvinte al ni centlinie, ke la Esperantan literaturon oni nepre ne rajtas kompari al iu ajn nacia, li fine konfesas: "Do mi nur parte konsentas la asertojn de Benczik kaj Lagrange pri la neta malsupero de nia literaturo kompare kun la naciaj", t.e. *komparas* mem en efektivo. Kaj en tiu lasta aserto s-ro de'Giorgi centprocente pravas: la artan, kulturen nivelon de la Esperanta literaturo al tiuj nacilingvaj komparas kaj li kaj ĉiuj ceteraj esperantistoj (kapablaj legi) kaj pretendas kompari precipe la neesperantistojn interesigantaj pri Esperanto kaj serĉantaj kulturajn valorojn ankaŭ ekster la kulturaj limoj de sia denaska nacio.

Kion faru neesperantisto scivolema pri (nur kelkaj nomoj tuj venintaj en la kapon por ekzemplo) la lastaj eseoj de Italo Calvino en "Amerikaj lecionoj" aŭ tiuj de J. L. Borges en "Sep vesperoj", aŭ pri "Entempla ceremonio kiel sintezo de artoj" de P. Florinskij? Li havas la solan elekton: ellerni la originalan lingvon, aŭ atendi la tradukon en sian nacian lingvon. Esperanton li ne bezonas, ĉar en Esperanto tiaj kaj tiuj verkoj forestas. Oni korektu min, se mi eraras pro neinformiteco, sed 99-procente mi certas, ke en neniuj el la 120 Esperanto-revuoj oni trovos tiujn kaj tiajn verkojn. I.a. la troa kvanto de E-revuoj por nur 10 000-kapa legantaro diras al mi ankaŭ pri lukto de ambicioj ene de Esperantujo, pri ofta nekapablo estigi efikan internacian kunlaboradon. Mi preferus anstataŭ 120 nur 12 revuojn, sed dekoble pli imponajn, pli dikajn, kun vasta reprezento de aŭtoroj el plej diversaj landoj kaj laŭeble plej internacia legantaro.

Antaŭnelonge mi ricevis de mia brita amiko-esperantistino libron de George Steiner *Tolstoy or Dostoevsky (An Essay in Contrast)* [Tolstoj aŭ Dostojevskij – Eseo kontrasta] – verkon kapablan aldoni specifan pluson al rusa kulturo, certe interesan por nia intelektularo. Kiel tion rigardi tra "verda prismo"? Simple: rusa intelektulo por kontentigi siajn intelektajn bezonojn devas bone scipovi la anglan, sed Esperanton nur leter-nivele, ne pli, kvankam mi persone kaj miaj kolegoj preferus legi tiun kaj tiajn librojn en Esperanto, kaj leterumi angle.

Ĉio dirita estas nur ilustrado al la antaŭlonge esprimitaj konstatoj de Helmut Welger (*Esperanto* 1982, p. 206): "La homoj pretas lerni la plej malfacilajn lingvojn, se ili opinias, ke tio sufiĉe utilos al ili... Tiu utilo estas por la unuopa homo nenio alia ol eblo kontentigi aktualajn, personajn kaj forte sentatajn bezonojn..." (emfazo mia). Rezulte ni havas en Esperantujo tion kaj tiujn, kies aktualajn kaj personajn bezonojn ĝi kapablas kontentigi: leterumadon, vojaĝojn, interŝanĝon de poŝtmarkoj k.s., inkluzive noktajn vizitojn al s-ro de'Giorgi por almozpeti valuton (vd. *Heroldo*, 10 feb. 1989). Mi nepre estimas tiujn valorojn de esperantismo (krom la noktaj vizitoj), sed ili ne

kontentigas: nek min, nek multajn aliajn, kiuj lerninte Esperanton ne restas en esperantismo.

En "Survoje" mi parolis ne nur pri integraj fortoj por elstaraj engaĝitoj, sed precipe pri la altiraj fortoj. Mi demandis min: kion necesas fari por ke la 10 000-kapa legantaro de E-literaturo estu pli granda dek-, cent-, mil-oble? Kion kulture valoran ni povas proponi honeste, sen blufoj al neesperantisto? Kiel pluevoluigi la sukcesojn kaj evitigi la mankojn?

La receptoj estas parte konataj:

1. Esperanto kiel kultura pontlingvo.

a) Ĉi-riate meritas atenton kaj subtenon la hispanlingva *Sonorilo* de LAPEK (Kolombio) kaj hungarlingva *Tekintet* de HEA, kiuj helpe de Esperanto peras valorojn el diversaj kulturoj al legantoj en siaj landoj. Jen "propagandilo" pli valora ol la plej profesinivela reklamo, jen pligrandiĝo de la legantaro, solvo de financaj problemoj...

b) Fakaj kaj kulturaj revuoj en Esperanto povas peri naci-kulturajn valorojn, kiuj en inform-fermitaj socioj ne estas alimaniere alireblaj. Ekzemplo: *Monadologio* de Leibniz en rusa traduko estas bibliografia raraĵo. En *Simpozio* n-ro 12 oni trovas la esperantlingvan version de tiu verko. Nun mi povas jen traduki ĝin en la rusan por miaj provincurbaj kolegoj, jen instigi intelektulojn soifantajn je tiaj verkoj ellerni Esperanton.



"Serioza laboro" jam en kelkaj revuoj...

Nepre valoras trovi en Esperanto necenzuritan version de verko, kiun en nacilingva traduko kripligis cenzuristoj, kaj plurajn, laŭeble ĉiufankajn komentojn al kultura valorado, kiun en la kadroj de ŝtata kulturpolitiko oni komentas tendence, nesufiĉe aŭ prisilentas. Ekzemplo: komentoj pri *The Satanic Verses* [La satanaj versoj] en *SLEA-informilo* 2/89, kaj precipe en *La Gazeto* n-roj 21, 23 dum en Sovetio – relativa prisilento. Valoras ankaŭ "malkovri" kaj prioritare disvastigi forgesitan aŭ nesufiĉe aprecitan kulturen valoron reaktualigintan hodiaŭ. Ekzemplo: poemoj de R. W. Emerson (19-a jarcento) aktualiĝis nur en la sesdekaj jaroj de la kuranta jarcento; oni komparu reagojn de Gottsched aŭ Voltaire al verkoj de Shakespeare kun la aktuala apreco de Shakespeare.

c) Depon-centroj de vastatema faka esperantlingva kaj nacilingva literaturo, kun nepre detala bibliografia inform-bulteno kaj ebloj mendi necesan kopion en Esperanta versio, havas ŝancon prosperi, kondiĉe, ke tiaj centroj ekzistu en pluraj landoj kaj nepre kunlaboru kun koncernaj naciaj entreprenoj.

2. Esperanto kiel la fundamento por originala, unika internacia kulturo.

"Ni devas trovi novajn aktivec-tipojn, novajn metodojn, ni devas enkonduki novajn elementojn en tiu fenomeno, kiu nomiĝas Esperanto, por povi kvalite evolui, ĉar ĉion, kion ni per kvanta evoluo povis atingi, ni jam atingis (...) do, multe pli

Analize kaj aŭgure

Jubileo – jarcento de Esperanto. Div. aŭtoroj, komp. kaj red. Mark Fettes. Rotterdam: UEA, 1988. 164p. 24cm. Ilus. Prezo: 57,00 gld.

La centjara jubileo de nia lingvo, iom artifice plilongigita, definitive finiĝis en julio 1988. Estis necese publikigi ian “raporton” pri tiu unikaĵo, por ke estu registritaj por la nunaj esperantistoj kaj iliaj posteuloj la atingoj, sukcesoj kaj malsukcesoj de la jubileaj laboroj. Jen do tiu raporto, kaj agnoskendas, ke la redaktinto, Mark Fettes, brile plenumis sian taskon. *Jubileo* tute ne estas ia seka protokolo; male, ĝi estas plenŝtopita je valoraj kaj stimulaĵoj, kiuj analizas la pasintecon kaj aŭguras sagace la estontecon. Ekzemple, Claude Piron klarigas kial la longa batalo por ĝenerala akcepto de la internacia lingvo estas ĉiuokaze necesa:

Tuja ĝenerala akceptado de la lingva embrio kunmetita de Zamenhof submetus ĝin je disstreĉiĝoj, el kiuj ĝi ne eliĝus vivanta. Tiustadie, ĝi estis tro delikata, tro nekompleta. Ĝi bezonis sufiĉe longan vivperiodon en limigita, sed multkultura medio, por ke la necesaj alĝustiĝoj efektiviĝu, ke la signifkampoj (semantikaj kampoj) difiniĝu, ke korektiĝu la mankoj plej nature, per uzado. (p. 153)

Traleĝante la libron oni ekkomprenas, kiel ŝanĝiĝis niaj cirkonstancoj kun la pasado de la tempo, tiel ke nun per rerigardo tra la jarcento ni povas retaksi nian situacion kaj eventuale nian politikon.

Post enkonduka poemo de iu W. Auld, la libro komenciĝas per “Historio de Esperanto en datoj” (de d-ro Lins), kiu liveras en tre koninda maniero superrigardon de la ĉefaj mejloŝtonoj sur nia vojo. Poste nia “vivanta majstro”, Gaston Waringhien, aludas nian historion kaj la “katastrofojn, kiuj normale devus nian lingvon pereigi” – sed ne pereigis ĝin. Fine li tuŝas temon diskutitan de pluraj kontribuintoj al la libro: la interna ideo. Laŭ li,

Estas facile al realistaj spiritoj ironii pri la “interna ideo”: ili tamen atentu, ke la malsukceso de la ceteraj projektoj de Lingvo Internacia estis grandparte ŝuldata al la skeptika aŭ malamika sinteno de iliaj aŭtoroj kontraŭ tiu afekcia aspekto de la problemo. Kaj ili ankaŭ konsideru, ke tiu aspekto alprenis pli kaj pli da graveco en mondo submetata al la konstanta minaco de satelitaj atombomboj. (p. 21)

D-ro Ivo Lapenna trovas “bedaŭrinda” la terminon “interna ideo”, kaj preferas nomi “la saman koncepton humaneca internaciismo”. Elektu mem. Sed tiu parolado de nia iama prezidanto tre meritas nian atenton, precipe kiam li konkludas:

Ni konsciu, geamikoj, pri la tuta graveco de tiu ĉi Jaro, ĉar en tiu ĉi Jubilea Jaro kompletiĝas jarcento, dum kiu la lingvoprojekto de D-ro Zamenhof transformiĝis en vivantan, nuancitan, plensukan Internacian Lingvon de mondvasta internacia kolektivo. Tio okazis kontraŭe al teoriumadoj de lingvistoj, antaŭjuĝoj kaj superstiĉoj de multaj aliaj; malgraŭ malpermesoj, persekutoj, eĉ murdadoj de Esperanto-parolantoj; malgraŭ la du mondmilitoj, malebligadoj de internacia komunikado per dekretoj, cenzuradoj, konfiskadoj kaj multaj aliaj obstakloj... En tiaj cirkonstancoj la transformiĝo ricevas eĉ pli grandan signifon: ĝi estas unika evento en la kultura historio de la homaro, evento, kiu vaste transpasas la limojn de la relative malgranda rondo de esperantistoj kaj interesas, aŭ almenaŭ devus interesi, la tutan kulturan mondon. (p. 128)

da atento al la kulturaj, al la lingvoevoluigaj, al la lingvostudadaĵoj kaj per lingvo al la studado de pli seriozaj aferoj, al aplikado de Esperanto en sciencoj, ktp... do, ke unuflanke restu Esperanto la ilo de interkomunikado de turistoj, de simplaj homoj, de interamikiĝo, sed aliflanke – kaj tio ĝuste mankas – ĝi estu ankaŭ serioza objekto de studado kaj samtempe serioza ilo de studado de seriozaj aferoj.” (István Szerdahelyi, el *Opus nigrum* 4/88)

Unu el la seriozaj proponoj por studado de seriozaj aferoj estas tiu de Bernard Golden pri “Literaturaj kaj artaj komunikaĵoj” (vd. *La brita esperantisto* n-ro 884). Ĉu la esperantistaro subtenis? Seriozan laboron ni trovas en *Simpozio, Literatura foiro, La Gazeto...* Se paroli speciale pri Esperanta kulturo, mi vidas du manierojn por ĝia formado:

a) *sintezo* de nacikulturaj valoroj en specife novajn valorojn. La historioj de ĉiu artospeco, ĉiu aparta spirita valoro konvinke kaj konkrete montras kiel ĉiam okazis reciprokaj pruntoj inter la nacioj, kaj kiel en novaj historiaj kondiĉoj okazis rekrea sintezo en novajn kulturajn valorojn.

b) *evoluigo* de ekzistantaj kulturaj valoroj, t.e. provo prognozi la morgaŭon de koncerna kultura valoro. Espereble neniu neos, ke la hodiaŭa novelo kiel ĝenro esence distingiĝas de tiu en renesanco.

Ĉu ĉiuj kaj ĉiaj nacikulturaj valoroj taŭgas por la fundamento de nia celata kulturo? Se ne – laŭ kiuj kriterioj oni elektu tiujn? Kiel sintezi? Kiel evoluigi? Konsiderante, ke, por havi altiran forton, la kulturaj valoroj de nia celata civilizacio devas esti almenaŭ ne malpli valoraj ol tiuj naciaj, la tuta problemo reduktiĝas al tiu de necesa krea genieco en Esperantujo.

Pri la ebloj krei intelektan instrumenton kapablan pliaktivigi, plifortigi kreajn kapablojn de la homo okupiĝas grupo de intelektuloj en Sovetio. Almenaŭ survoje al la celo ni rajtas esperi aperon de konsiderindaj kulturaj valoroj. La intelekta instrumento, kiun ni celas ellabori, ne pretendas anstataŭigi la homon en la specife homa kreado de valoroj, nur helpi. Ĉu la esperantistaro bonvenigos tiun iniciaton, ĉu indiferece rifuzos, estas la afero de la esperantistaro. Mi (kaj espereble miaj kolegoj) pretas kunlabori kun ĉiuj E-revuoj kaj kolektivoj konforme al iliaj strategiaj celoj.

El ĉio dirita klaras la fundamento de mia filozofio: estimo kaj fido je intelektaj kaj kreaj potencoj de ĉiu aparta homo, konsidero de liaj spiritaĵoj bezonoj. Male, en la strategio konvinki aŭtoritatojn, gravulojn, registarojn k.s. oficiale agnoski Esperanton kaj poste “desupre” *trudi* Esperanton al la homaro, *devige* “feliĉigi” la homaron, mi trovas nuancojn de totalismo, nepre abomena por mi kaj por multaj aliaj.

Se, kritikante la aktualan staton de la Esperanto-movado, mi samtempe proponas ankaŭ pozitivan programon (kvankam ne senmankan), kion proponas al ni s-ro de’Giorgi? Li proponas ne fanfaroni, ne bagateliĝi, t.e. kontentiĝi je tio, kion ni havas. Mi protestas kontraŭ tia kontento. Jam en 1930 Ortega y Gasset en *La ribelo de la amasoj* skribis: “Sed hodiaŭ ni komencas kompreni, ke tiuj epokoj de memkontento – tiom glataj kaj brilaj ekstere – interne estas malvivaj. *La efektive plensanga vivo* [troviĝas] *ne en trankvilo de memkontento, sed en la procezo de atingado, en la momento de plusvalorigo*. Kiel diris Cervantes, ‘la vojiro ĉiam preferindas al ripozo’. Kiam epoko kontentigis ĉiujn siajn dezirojn, siajn idealojn, tio signifas, ke deziroj ne plu ekzistas, la fonto de deziroj elĉerpiĝis. Konklude, la epoko de la tro preparolata memkontento estas *la komenco de fino*.”

En malkontento pri aktualaj atingoj troviĝas la motoro por pluaj atingoj. Esperantistoj elektu mem: ĉu pro malkontento serĉi rimedojn al pluiro, ĉu stagnadi en memkontento?

Aleksandr Fjodorov (Sovetio)

D-ro Lins havas tion ĉi por diri pri tiuj “obstakloj”: “[hodiaŭ] neniun registaro kuraĝas esprimi sin malŝate pri celoj kiel paco kaj interpopola kompreniĝo. Sed ĉiam ankoraŭ ni povas observi, ke per alekstera sinfermo, vojaĝaj malhelpoj, kontakt-malpermesoj, per ideologia kuratoreco kaj unuflanka kultura propagando konstruiĝas baroj, kiuj kontraŭas la deziron de la homoj je renkontiĝo, dialogo kaj edukiĝo” (p. 154). Internacia kunlaboro limiĝas al “rilatoj inter ŝtatoj kaj eta elito de lingvokapablaj intelektuloj kaj ne inkluzivas kontaktojn inter la ordinaraĵoj civitanoj”. Esperanto, kontraŭe, estas lingvo maksimume demokratia.

La tutmonda agado de niaj movadanoj dum la jubilea jaro estas resumita unue internacie, poste per mallongaj raportoj el 51 landoj (inkluzive de afrikaj!), kune kun pli longaj kontribuoj el kvar el ili pri gravaj aktualaj demandoj. La elstara evento de la jaro, kompreneble, estis la 72-a UK en Varsovio, al kiu venis pli ol 6000 esperantistoj (ĉar ĉiu scias, ke ne ĉiuj ĉeestantoj fakte pagis sian kotizon!) el almenaŭ 73 landoj. Saĝe la redaktinto elektis prezenti la Kongreson per bildoj anstataŭ pli da teksto, kaj tiu rimedo vigle sentigas la etoson de la aranĝo. Efektive, necesas diri, ke en la libro troviĝas tre multaj ilustraĵoj, kaj la reprodukto (malsimile al iuj lastatempaj eldonaĵoj) estas unuaranga, liverante konservindan arĥivon pri la nuna stato de la movado. Tekstoj tamen ne tute mankas: ni legas la Saluton de d-ro L. Zaleski-Zamenhof, paroladon de la Prezidanto de UEA, kaj la gravan Deklaron de Bjalistoko.

Aliaj gravaj internaciaj aranĝoj estas raportitaj: la Jubilea Esperanto-Konferenco en Graz, Aŭstrio (kun la parolado de d-ro Lapenna, kaj ankaŭ prelego pri Esperanto en la servo de la natursciencoj, de prof. Neergaard), la Internacia Junulara Kongreso en Krakovo, la festivalo “Cent jaroj de Esperanto-kulturo” en Zagrebo, kaj la internacia scienca simpozio “Esperanto 100-jara” en la Universitato de Vieno. Kompletigas la libron kontribuoj de i.a. Ĵak le Puil, Juan Régulo, kaj tri el niaj plej eminentaj poetoj (De Kock, Ragnarsson kaj Nervi).

Mi ripetas, ke tiu ĉi libro estas vere valora kaj daŭre leginda. Mi havas nur unu kritikon. Se oni (prave) raportas amplekse pri tiom da gravaj internaciaj aranĝoj (inkluzive tiun organizitan de NEM), kial do la SAT-kongreso en Bulonjo ne meritis pli ol flankan aludon en la franca raporto kaj en alia loko la forpuŝan frazon, ke ĝi “restas iom ekster la kadro de ĉi tiu libro”? Kiam temas pri la Jubilea Jaro...

W. Auld (Skotlando)

Kosma poezio, se vi ne lasos vin tediĝi

Terra. István Nemere. Budapeŝto: Hungara Esperanto-Asocio, 1987. 150p. 20cm. 18,00 gld.

Yarkos, la fabelisto, pretendas esti esplorinta Terra-n. Yarkos, la esploristo, fabelos televide pri Terra. Dekmil jarojn en la estonteco, ni sekvos la programon. Kaj kun ni la instancoj de galaksio Metastella, kiujn la programo maltrankviligas pro la herezaj supozoj, ke ĉiuj homoj en la konata universo praparencas kun teranoj; kaj ke tiuj teranoj iam murdis, militis, kaj detruis sian patrinan planedon. Samtempe, mistera hermafrodito ŝtel-trovas kaj detruas la lastan atestaĵon, ke Terra fakte ie ekzistas.

István Nemere, sendube la plej produktema romanisto iam ajn en Esperantujo, laŭ sia meritplena kutimo celas kaj kapteman intrigon kaj meditindan idearon. Ĉi-verke li strebas kontentigi la du ĉefajn grupojn da sciencfikci-amatoroj. Sed tiuj, kiuj preferas ekscitajn kosmajn aventurojn trovos la intrigon de *Terra* iom monotona. Kaj tiuj, kiuj serĉas en sciencfikcio

pensigajn supozojn pri la universo trovos la spekulativon ne tute originala.

Nek la intrigo nek la bildo de la estonteco plene konvinkas. Kiel Yarkos povas samtempe furori kiel universale konata fabelisto kaj pasigi jardekojn en hibernigilo survoje al univers-randaj galaksioj? Ĉu verŝajne, ke dum dekmilo da jaroj la homoj solvis la plej gravajn problemojn pri intergalaksia veturado kaj pri medicino, sed ke la uzo, funkcio kaj aspekto de komputoroj ne esence ŝanĝiĝis de tiaj, kiaj ili estis en 1985? Ĉu estontece, kvazaŭ en 1960, reaperos sur la televidaj ekranoj kaj eĉ entuziasmigis la spektantojn iu kapo, kiu nur paroladas, sen helpo de ajnaj bildoj aŭ grafikaĵoj? Kiel imageblas kosma Jacques Cousteau sen kameraoj nek filmo?

Je la kredito de Nemere, la ekspluato de la konceptoj estas ofte lerta. La rakontarto, nekutima, tamen efikas. La diskutoj pri la origino de la homoj, de la spaco kaj tempo evoluas ne-perceptebla en kosman poezion. Aparte sukcesas la ekologia himno al la belaĵoj de Terra. La romano ja starigas demandojn pri la universo kaj ties enloĝantoj, sugestas plurajn respondojn, sed lasas, ke la legantoj plu meditu.

Terra ne facile legeblas. La legantoj peni preteratenti la svarmantajn preserarojn. Ili ne cedu al la tediĝemo de la unuaj paĝoj, kaj ne senkuraĝiĝu en la senĉapitra maro da teksto. Sed ili ne dubu, ke atentan legon, prefere eĉ re-legon, ĉi tiu romano rekompencos plene.

James F. Cool (Usono)

Aktualeco sen riskoj?

Dum vi estis kun ni. István Nemere. Budapeŝto: Mendoservo/HEA, 1988. 165p. 21cm. 21,00 gld.

Nia plej populara aŭtoro. La romanisto de la okdekaj jaroj. Ktp. Ŝajne necesas jam libreto enhavanta recenzojn kaj, espereble, pli ampleksajn, detalajn kaj ambiciajn studojn pri liaj romanoj.

Ĉi tiujn mi distaksas jene: bonegaj (*La blinda birdo*, *Sur kampo granita*), malbonega (*Terra*) kaj “neknokaj”, t.e. akcepteblaj aŭ sufiĉe kontentigaj, kiel *La monto*, *La alta akvo*, *Serĉu mian sonĝon...* kaj tiu ĉi, *Dum vi estis kun ni*.

Kiel la aliaj, ĝi estas teme aktuala. La aŭtoro vane klopodis kaŝi, ke temas pri eŭtanazio kaj eŭtanaziismo, ĉar bedaŭrinda eldoneja reklamteksto unuapaĝe sciigas: “La aŭtoro metas la dolorigan demandon enkadre de ekscite legiga detektiva historio, ĉu eŭtanazio povas esti prava, ĉu homo rajtas helpi morti al sia proksimulo laŭ ties peto?”.

Kvankam multaj konsideras eŭtanaziismon “naziismo kun greka prefikso”, por multaj aliaj estas home, humane kaj humanisme eŭtanazii mortadanton (eventuale eŭtanaziigi sin mem) por fini longdaŭran agonion. Tio signifas, ke Nemere povas verki pri tiu ĉi problemo laŭ ambaŭ flankoj, same kondamne, kiel apologie. “Teorie” esperantistoj ne rajtas rasismi, esti ksenofoboj aŭ defendi klitorekscizon, sed pri eŭtanazio Nemere ne decidiĝas al partio. Li ne riskas: se la ĉefrolulo kontraŭas eŭtanazon, ĝin aprobas iel aŭ aliel ĉiuj vicroluloj, ekzemple kuracisto, pastro (eĉ!), juristo, kaj “perfekta” patrino.

Sekvas, ke la romano havas propran “murdon de Stefano Bende”. Ĉar Nemere ne volas solvi la problemon, kiun li starigas, li fine devas aperigi tute nebezonindan kaj maloportunan *deus ex machina*, kies romana nomo estas Andreĉjo.

Grava novaĵo estas, ke la aŭtoro prezentas homojn kaj ties rilatojn refoje en Hungario. Hungaras nomoj de personoj kaj lokoj, la fono estas realisme kritika kaj akuza. Nemere verkas pri nova politika atmosfero, pri burokratismo, pri koruptoj kaj koluzioj, pri ciganoj... li eĉ rekte atakas la ŝtatestron de Rumanio (p. 40) laŭmerite. Unufraze: for la neŭtralismon!

Bedaŭrinde mankas lingva (ne komposta) revizio. Mi ne sentas min Ergoto de Bonaero, sed tamen nepras atentigi pri vortoj, kiel *motocikl(et)o*, *kemikaĵo*, *dissekcio*, *organizo*, *prostituĉio* (p. 81 kaj 85, 130, 72 kaj 79, 128, 45) anstataŭ *motorcikl(et)o*, *kemiaĵo*, *dissekco*, *organismo*, *prostitu(ad)o*. Eble Nemere verkas tro haste, eĉ hungare aŭ almenaŭ hungarece – aŭ ĉu eble ankaŭ eldonejoj tro rapidas?

Georgo Kamaĉo (Hispanio)

Flagroj de verkista lerto

Bestoj kaj homoj. Bernard Golden. Pizo: Edistudio, 1987. 137p. 21cm. 27,00 gld.

Patrino koro. Nevena Nedelĉeva. La Laguna/Roterdamo: J. Régulo kaj UEA, 1975/1988 (preso/eldono). Beletraj Kajeroj n-ro 47. 147p. 17cm. 12,00 gld.

Mistera lumo. Julian Modest. Budapest: Hungara Esperanto-Asocio, 1987. 90p. 20cm. 12,00 gld.

Esperantistaj prozistoj verkas pli da rakontoj ol da romanoj. Por produkti rakonton, ĝenerale necesas malpli da tempo. Rakontoj facile trovas lokon en la movadaj revuoj, kiuj volonte regas siajn legantojn per paŭzoj da fikcio inter klubaj raportoj kaj strategiaj planoj. Rakontoj, fine, povas profiti duan vivon en libra formo, kiam ili atingas nombron sufiĉan por iĝi kolekto. Tiel formiĝis ankaŭ la tri recenzataj rakontaroj. Du el ili aperis en la jubilea jaro, dum *Patrino koro* havas daton 1975, sed, pro la sortovicoj de la eldonejo Stafeto, nur lastatempe surmerkatiĝis.

La rakontemo de Bernard Golden naskiĝas en ekzotaj aŭ nekutimaj panoramoj. Faktoj okazas sur scenejoj kiel eble plej malproksimaj de la ĉiutaga vivo, personoj rolas en turisma, esplora ekzisto. La libro-titolo, *Bestoj kaj homoj*, trovas sian klarigon en la unua el la 13 rakontoj. La aŭtoro prezentas ĝian malheroon kiel personon malagrablan, vulgaran, minacan,

danĝeran: sume, abomenindan. En la fino de la rakonto, la ulo sinmortigas: ĉu estas bestoj aŭ homoj la kunuloj, kiuj ne kapablis kompreni lin? Forta kulposento pezu sur la aŭtoro mem, kiu pentris lin tute senkompate.

Golden verkas senerare, eĉ foje elegante. Sed lia maniero kunmeti historiojn malofte evitas kliŝajn sinsekvojn de pri-skriboj kaj dialogoj. Li do pli bone sukcesas en rigida rakonta formo kiel fabelo: “La nekonstruebla turo”, ekzemple, bone amuzas, ankaŭ ĉar ĝi disvolviĝas en... Volapukio.

Male, la temoj de *Patrino koro* venas el la ĉiutaga vivo. La stilo de Nevena Nedelĉeva kapablas vekti emociojn, la simpleco de ŝia lingvo sugestas superan verkistan lerton. Bedaŭrinde, moralecaj intencoj multe pezas sur la 13 rakontoj kaj 2 teatraĵetoj, kiuj konsistigas la kolekton. Kvankam ankaŭ Esperanto cefrolas en la programitaj moralinstruoj, la leganto dronas en siropan etoson de artefarita optimismo. Kiel domaĝe, ke perfekta interplektado de dialogo kaj belege aluditaj travivaĵoj, ekzemple ĉe “En kunveno”, nur servas la sloganon mesaĝon, ke oni ne flustru kaj krokodilu ĉeestante Esperantajn prelegojn!

La rakonto “Mistera lumo”, kiu donas la titolon al la 19-era kolekto de Julian Modest, sukcese elvokas la momenton hazardan kaj sekretan, kiam decidiĝas gravaj ŝanĝoj en la vivo de homo. Temas pri sperto netransdonebla eĉ al amiko, pri evento aŭ ekkompreno, kies okazado senrevene modifas ekziston: en la metaforo de Modest, “blindiga, blua lumo”.

En pluraj el la rakontoj de Julian Modest, aŭ infanoj rolas, aŭ infanaĝaj rememoroj elvokas faktojn kaj personojn. Foje ĉio komenciĝas de objekto, de senmova aĵo posedanta propran historion. Ambaŭ trajtoj, infana rigardo kaj objekto kiel atestaĵo de pasemaj epokoj kaj homoj, troviĝas en la rakonto “La argila kamelo”, kie konstrua lerteco, simpla kaj preciza lingvo, homa partopreno kaj klarvida sento de la tempofluo kuniĝas por krei veran juvelon.

Giulio Cappa (Italio)

Kelkaj perloj en neluksa prezento

Amo, amo, adoro. Mira Andrusiewicz. Jelenia Góra: Sociokultura Societo kaj Pola Esperanto-Asocio, 1987. 67p. 20cm. Ilus. 15,00 gld.

Vagante tra la mondo maltrankvila. Nadija Hordijenko-Andrianova. Budapeŝto: Hungara Esperanto-Asocio, 1987. 102p. 20cm. 13,80 gld.

Enlumiĝo. Albert Goodheir. Glasgow: Kardo, 1987. 44p. 21cm. Ilus. 11,10 gld.

Tri ’stas tro. Gerrit Berveling. Vlaardingen: Vlardingenaj Kajeroj, 1987. 44p. 21cm. Ilus. 6,00 gld. Dua eldono: Chapecó: Fonto, 1988. 60p. 21cm. Fonto-Kajeroj n-ro 3. 7,20 gld.

Malagrabla kaj riska tasko recenzi samtempe kvar samĝenrajn verkojn. Precipe ĉar tio kuntrenas neeviteble komparojn, kaj komparoj povas esti malsimpatiaj. Sed la okazo havas ankaŭ pozitivajn flankojn, ĝi ja estas tikla defio senkompromisi, lasi flanken la kutiman “verdan solidaron”, kun la implicita celo instigi la potencialajn legantojn kontroli mem ĉu la recenzinto trafis per objektivaj kaj fidindaj juĝoj.

La libreto de Mira Andrusiewicz enhavas 68 poemojn, ĉiujn verkitajn de nia pola poetino antaŭ pli ol 20 jaroj, kiam la kolekto estis preta por eldono ĉe Stafeto. Bedaŭrinde, tiu tempodistanco iom percepteblas: iela impresado de malnovstilo. La titolo jam liveras la precipajn temojn de la verko. Amo aŭ

amoro, jes, foje delikata, kortuŝa, sensiva, alifoje pasia, tragika, violenta kaj senpruda, iel Urbanova-eca (kio estas komplemento), ĉiam sincere inspirita. Sed ankaŭ meditadoj, demandoj pri la vivproblemoj (kiu poeto ne temis prie?), kc. La poemoj tre varias, ofte liberversas, foje rimiĝas, ĉiam neregule, sen antaŭfiksitaj skemoj. Kio ne signifas, ke ili ne povas senstumble muziki, kvankam tio nur intermite okazas. Sufiĉe varia, flua kaj korekta la lingvouzo, escepte pri verba transitivado (“la nokto sekretas misteron”, “dronante min”, “spiras la kolon” ks), kelkaj pionirecaj strangaĵoj (“sur via ridas buŝo”) kaj stumbloj (“malaperis rid’ kara”).

Kion konklude? Ke, malgraŭ la noca malfruo kaj la notitaj mankoj, la poetino vekis en mi simpatian. Kaj kelkaj poemoj estas ĉarmaj, jen eta ekzemplo (“Kanibalo”):

Malkonscienca kanibalo
– li jam formanĝis tutan koron,
nesatigita manĝulaĉo,
li jam fortrinkis sangon, ploron;
animon tamen li demetis
– nedigestebla, do forĵetis...

Nia konata ukraina poetino Nadija Hordijenko-Andrianova kolektis en sia libro 55 poemojn, ĝenerale verkitajn per flua, belsonaj versoj, foje rimitaj, foje blankaj, kaj per senriproĉe eleganta lingvaĵo.

Ĉeftemo kaj celo de la verko estas tuj unuavide klaraj: kanti danke kaj apologie pri gaste vizititaj lokoj, himni pri iu difinita

sociordo, mesie apelacii al paco, homfrateco, kontraŭmilitismo. Tamen la titolo ne misvojigu, tiu *mondo* limiĝas al kelkaj orienteŭropaj landoj vizititaj, precipe okaze de la UK en Varna, en 1978. Tial la temoj iom monotonas kaj malofte atingas puran poeziecon. Fakte tre malfacile estas ĉiesigi siajn emociojn kaj admirojn pri iu loko nur pere de priskribado, tiel tiuj sentoj restas plejofte nur personaj kortuŝoj de la aŭtoro. Same, kiam oni verkas ideologiajn mesaĝojn propagandajn, estas preskaŭ neeviteble fali en naivan emfazon, retorikemon, kliŝecon, ĉiujn ingrediencojn netaŭgajn por krei poezion.

Nepras tamen aldoni ke, feliĉe, kiam nia poetino ne engaĝitas, kiam ŝi sin allasas al propraj intimaj sentoj, travivitaj ĝojoj kaj suferoj, aŭ kiam ŝi simple elegias pri la mirindaĵoj de nia naturo, tiam ŝi atingas fajnan lirikecon, finfine delikate poezias. Vidu, ekzemple (“Printempaj etudoj”):

en homanimo same ĝermas la burĝonoj:
sub akompan’ de majaj klarionoj
ni same renaskiĝas en konkuro
al nova viv’, al nova bonespero...
Magi’ eterna de la Primavera!

Albert Goodheir estas tro konata poeto por lin priskribi kaj difini. Iam mi diris, ke laŭ mi, nur li kaj Mauro Nervi povas esti konsiderataj la nepraj steloj, la plej kompletaj kaj maturaj poetoj de nia verda Parnaso dum ĉi lastaj jardekoj. Kaj la ĉi-koncerna kolekto, aperinta dek tri jarojn post la unua, furora *Merlo sur menhiro*, konfirmas mian iaman juĝon. Sed, ĉiam laŭ mia modesta pritakso, ĝi nemulton aldonas al la jam rekonata elstareco.

Goodheir, laŭ Auld “poeto de l’ naturo” (kiomaj poetoj ne estas tiaj?), laŭ Tonkin “de l’ nordo” (kia Hilda Dresen?), laŭ Pignatelli “de filozofio (Spinoza) kaj de iu pagana, natura religio” (Gaja, la terpatrino. Ĉu en la dudeka jarcento?). Do poeto multifaceta, varie interpretebla, sendube riĉpaleta, fund-inspira, majstra elektanto kaj muldanto de vortoj kaj frazoj. Kaj fakte pluraj poemoj estas modelaj laŭteknike kaj ravaj laŭsence. Kiel la belega soneto enkonduka, kiel “Adoro”, “Pri meditado” (“kial limigi vorte la sennoman? / Ĉu por difini amon oni amas?”) kaj multaj aliaj. Mi tamen ne konsilas akcepton de lia baroka kaj sensignifa eltrovo, la “norda strofo”, en *Parnasa gvidlibro* (kiu, cetere, jam estis diskutinda anakronismaĵo kiam ĝi aperis, nun...). Prefere ni legu kun ĝuo liajn muzikecajn skandojn en la liberversaj poemoj (ekz. “Antaŭ matena roso” kaj “Pluvo”), pardonante al li la finan aldonon de iom banaletaj rimitaĵoj.

Lasta recenzo temas pri **Gerrit Berveling**, laste aperinta poeto en nia ne plu tiom mikra firmamento poezia. “Last but not least”, kion mi povus traduki per “fine sed ne fone”, ĉar, el pluraj vidpunktoj, tiu nederlanda versisto estas eble la plej tikle interesa. Pro la bunta vario, eĉ pro la kontrasta malharmonio de la temoj, de la pensotezoj, precipe de la versteknikoj. Li “celas liveri bildon nunrealajan pri iu homa vivo en la 80-aj jaroj”. Ĉu li sukcesis? Verŝajne ne: foje tro konfuzaj, tro pretendaj la konceptoj, ofte tro abstrakte aŭdaca la esprimado. Sed finfine ne malinterese. Intermiksita: intima, ama sed ankaŭ filozofiema kaj socia Muzo, ofte demandosigna poezio (Kio estas viv’?, Por kio ni estas surtere?), do entute poezio remaĉata de ĉiu novico, la rezulto dependas nur de originaleco kaj eleganteco de la formo, de denso kaj profundo de la pensoj. Kaj Berveling foje sukcesas, foje dronas. Tro da diferenco inter kelkaj poemoj, senriproĉe belaj, kaj aliaj, enigme povraj. Inter la unuaj, du ekstreme belaj tercinaroj, laŭ Dante-a modelo (“Ĉar kiel saĝi, kie vi Nemezas? / Sur strando mi rimarkis mian onton: / kaj ose mi nenion plu aprezas, / se ĝi al mi forŝiras horizonton...”), aliloke atentindaj vortludoj (“Tri ’stas tro... Tristas tre”) kaj seksaj aŭdacaĵoj (“Ja

kiu neniam karese ektuŝis virilon kunknaban?”). Klasikaj influoj estas are rimarkeblaj. Resume kaj ripete: nepre atentinda, leginda poeto, kvankam tre malhomogena, ĉiukaze unu el la plej modernaj el la novalvenintoj. Ni atendu kun espero evoluon.

Ĉiuj kvar verkoj estas eldonitaj de la aŭtoroj mem aŭ de komplezaj asocioj. La aspekto estas pli-malpli modesta, certe ne-luksa. Ĉi tio evidentigas ke la lastatempa ostracismo de niaj eldonistoj por poeziaj verkoj daŭras senkompate. Mi tion ege bedaŭras, ĉar, ĉu tio plaĉas aŭ ne, en nia lingvo poezio ĉiam estis – kaj restas, laŭ mi – la ĉefa, la plej produktiva evoluigilo; nur danke al ĝi Esperanto fariĝis la nuna, ekstreme elasta kaj riĉa esprimilo, kiun ni konas kaj profitas. *Memento homine!* (Primeditu homo!)

Aldo de’Giorgi (Italio)

Kantoj de amo kaj morto

Desislava ridetas. Lirika poezio kaj satira prozo. Giorgio Silfer. La Chaux-de-Fonds/Milano: Kooperativo de Literatura Foiro, 1987. 74p. 21cm. Prezo: 22,50 gld.

La leganton, prenintan unuafoje la libron, povas dubemigi nekomprene: ĉu multe onin interesas la persona vivo de la aŭtoro? Ĉu li ne vidas la vivon ĉirkaŭ si? Ĉu li ne vidas suferojn krom la sian? Sed ĉu la ekzemplo de sincera, seniluzia amo, amo firma en sia febleco, ne estas grundo fekunda por kulturi la humanisman koncepton de la mondo? Kulturi, sed... ne konstrui, mekanike.

La libron motas poemo de Eŭĝenio Montale, itala hermetisto (kiel oni lin nomas, sed kion li fakte ne agnoskis). Kaj videble, ĝi ne nur motas, sed ankaŭ movas kaj motivas. Hermeta. Ĉu izolita en si mem? En la intermilita periodo de la itala literaturo ĝuste la hermetistoj, direktintaj sin al la ĉiutaga naturo, al la homo pure homa (almenaŭ en si mem), sukcesis resti sur la pozicioj de la humanismo, malkiel la futuristoj, glorintaj la teknikan progreson kaj venintaj al la subteno de la faŝismo (faskismo), deklarintaj militon “higieno de la mondo”.

La vivon, sekve ankaŭ la poezion ĉiam movas tamen ne dizelo, sed amo. Amo al virino ĉiam estis la ĉefa motoro de liriko. Ĝi estas prismo, tra kiu poeto vidas kaj amas la mondon: la naturon, la aliajn homojn. Sen ĝi, sen strebo doni impulson al nova vivo perdiĝas la senco de ekzistado. Kaj la frustracio de la konkreta realiĝo de tiu impulso (“Nia filo mortis”) naskas dramon, manifestiĝintan en la splenaj, tristaj poemoj.

Tamen memobsedo ĉu en “febleco”, ĉu “en la gloro de beato”, kumuliĝinta en vortoj, faras ioman repuŝan efekton, ja laŭ la sama Montale:

Vi min perfidas, vortoj miaj. Fuŝe
nudigas vi la karnon de la koro.
La veron oni pruvas ne perbuŝe,
ĉar muta estas kantilen’ kun ploro.

Krome, ne ĉiuj poemoj de la libro tuj malfermas sin al la leganto. La asocioj kaj aludoj estas tiom subtilaj, personaj, aŭ apogitaj je vasta kultura kampo, ke estas malfacile trovi leganton, kiu komprenus la aŭtoron adekvate, kaj sekve perdiĝus la senco en la publika prezento de la verkoj. Do, malfacile iun apartan poemeton eligi el la libro, kiu prezentas sin kiel kompleksa artefakto, iom simila al *Memkritiko* de V. Sadler; sed la aŭtoro nur donas al la leganto temperon por kelkiom cerbumi mem-stare, antaŭ ol perpleksite turni sin al la apendico, aŭ demeti la libron flanken. Tamen kelkloke, kiel ekzemple fine de la “Danka bukado por Perla”, la bildoj, jam ne ligitaj al pure personaj impresoj, subite klariĝas, kaj la leganto jam senpere ĝuas la poezion de vortoj.

Nikolaj Lozgaĉev (Rusio)

1905: Prologo. E. Nikitina. Ilustris B. Laps'in. El la rusa trad. E. Ševčenko, L. Novikova. Moskvo: Progreso, 1989. 160p. ISBN 5-01-001859-4. 23cm. Bele pentrita bildrakonto pri "la unua rusia revolucio", kiu emfazas la socian kaj politikan fonon de la kontraŭcara movado. 10,50 gld.

Antologio de Esperanto. Div. aŭtoroj. Komp. Yang Fan k.a. Hefei: An'hui-a Universitato, 1984. 222p. 19cm. Originala kaj tradukita poezio kaj prozo, de klasikaj ĝis lastatempaj aŭtoroj, kun ĉinlingvaj glosoj. 7,50 gld.

Atesto de Jozefo Smith, La. Jozefo Smith. Beaufays: Por-Esperanta Mormonaro, 1988. 24p. 21cm. Fundamenta dokumento de la mormona kredo. 2,10 gld.

Bona lingvo, La. Claude Piron (1931-). Vieno/Budapest: Pro Esperanto/HEA, 1989. 111p. ISBN 963 571 294 4. 20cm. Elokventa, konversaci-stila pledo por la riĉeco de "reala", parolata Esperanto, surbaze de psikologiaj, stilaj kaj sociaj konsideroj. 14,10 gld.

Ĉunhjang. Koreaj rakontoj. El la korea trad. (1975) Cho Sung Ho. Seulo: Korea Esperanto-Asocio, 1989 (tria eldono). 39p. 21cm. Tri antikvaj fabeloj, kiuj reliefigas la virtojn sindonemo, justeco kaj honesteco. 2,70 gld.

Corrigé des exercices. Pol Denoël. Wilrijk: Eldonejo-Librejo Sonorilo, 1989 (dua eldono). 16p. 21cm. Mimeo. Solvoj al la ekzercoj de la lernolibro Initiation théorique et pratique (1934). 8,40 gld.

En orda malordo. A. Lopez Luna. Buenos Aires: Amigos de Lopez Luna, 1989. 102p. ISBN 950-43-2406-1. 17cm. Diversaj pensoj pri la homa vivo. 9,00 gld.

Eseoj 1. Beletro. Gaston Waringhien (1901-). La Laguna: J. Régulo, 1956 (dua bindo Roterdamo: UEA, 1989). Stafeto, Belliteratura serio 6. 232p. 21cm. Dudeko da kleraj studoj pri la eŭropa kaj Esperanta literaturoj, en majstra stilo. 45,00 gld.

Esperanto for hope. A new way of learning the language of peace. Máire Mullarney. Dublin: Poolbeg, 1989. 184p. 20cm. Rakonto pri la esperantistiĝo de la aŭtoro, kiu tiel samtempe prezentas argumentojn por Esperanto, priskribon de la movado kaj bazan kurson pri la lingvo mem. 22,50 gld.

Esperanto. Eine Einführung in die moderne Umgangssprache, Heft 1. Herbert Mayer. Wien: Pro Esperanto, 1989. 83p. 30cm. Mimeo, ringbindaĵo. Komenco de baza kurso. 29,40 gld.

Evoluo de la kooperativa movado en Popola Respubliko Bulgario. Nacia sperto. Nikola Válev, J. Delčeva-Pejkova. El la bulgara trad. Georgi Dolapčiev. Sofio: Centra Kooperativa Unuiĝo, 1986. 48p. 20cm. 2,10 gld.

Floroj de l' malbono. Charles Baudelaire (1821-1867). El la franca trad. diversaj; kompilis kaj redaktis K. Kalocsay kaj G. Waringhien. La Laguna: J. Régulo, 1957 (dua bindo Roterdamo: UEA, 1989). Stafeto, Belliteratura serio 8-9. 398p. 21cm. Unike kompleta eldono de la ĉefa originala poemaro de Baudelaire, kiu skuis la eŭropan literaturan mondon per sia senkaŝa rigardo al la altoj kaj malaltoj de la homa naturo. 60,00 gld.

Freinet kaj moderna edukado. Michel Barré. El la franca trad. Simone Boniol. Parizo: ICEM-Esperanto, 1988. 48p. 21cm. Mimeo. Ilus. Enkonduko al la ideoj de franca pioniro pri libera, sinesprima edukado de infanoj. 9,30 gld.

Introduktion till Esperanto. Bertil Nilsson. Nyköping: Vidya Förlag, 1988. 30p. ISBN 91-86952-01-3. 15cm. "Kiel eble plej simpla" prezento por svedlingvanoj. 5,10 gld.

Kapo de l' gorgono, La. Dramoj kaj poemoj (1912-1916). Lev Levenzon. Antaŭparolo de H. Mayer. Vieno: IEMW, 1989. 40p. 30cm. Mimeo, ringbindaĵo. Verkaro el la manuskriptoj de Internacia Esperanto-Muzeo: simplaj, fluaj rakontoj el la helena mitologio. 22,80 gld.

Kromosomoj. Lorjak (ps. de J. Mahé). Antverpeno: Flandra Esperanto-Ligo, 1989. 152p. ISBN 90-71205-26-6. Serio "Stafeto", n-ro 10. 20cm. Ĉu la murd-instinkto estas heredebila? Sprita romanisto disvolvas la temon en sia propra maniero. 15,00 gld.

Kvaropo. W. Auld, J. Dinwoodie, J. Francis, R. Rossetti. La Laguna: J. Régulo, 1952 (dua bindo Roterdamo: UEA, 1989). Stafeto, Belliteratura serio 1. 267p. 21cm. Lanĉa poemaro de la "skota skolo", kiu inaŭguris novan epokon en la originala literaturo. Deviga legaĵo por ĉiu, kiu deziras kompreni la transiron inter la Parnasismo de Kalocsay kaj la moderna Esperanta poezio; la kontinueco klare videblas en ĉi tiu libro. 48,00 gld.

La kooperativo-disvolviĝo kaj estonteco. Ivan Prâmov. El la bulgara trad. Georgi Dolapčiev. Sofio: Centra Kooperativa Unuiĝo, 1984. 38p. 21cm. Mimeo. Pri la evoluo en socialismaj landoj. 2,10 gld.

Malsupra tero. Angel Guimerà (1849-1924). El la kataluna trad. Ricard S. Güell. Barcelona: la tradukinto, 1975 (?). 50p. 19cm. La plej konata kataluna dramo, pri amo, mono kaj potenco en la kampara socio. 6,90 gld.

Manlibro de ĉina-Esperanta konversacio kaj leksikono. Yu Dequan. Yanbian: Yanbian-a Universitato, 1988. 350p. 19cm. 12,00 gld.

Memorlibro pri la Internacia Jubilea Esperanto-Konferenco, Graz 1987. Red. Klaus Perko. Rødovre: Perspektivo, 1989. 168p. ISBN 87-982430-3-9. 21cm. Ilus. Dokumentoj kaj prelegoj pri la temo "Cent jaroj de Esperanto-kulturo", al kiu kontribuis i.a. I. Lapenna, J. Régulo, M. Boulton, B. Ragnarsson, P. Neergaard. 50,70 gld.

Recenzo-bibliografio. Paderborno: Esperanto-Centro Paderborno, 1989. 40p. 21cm. Indekso de recenzoj el kvin revuoj en la periodo 1982-somero 1988. 9,90 gld.

Simpla koro kaj Herodiasa. Gustave Flaubert (1821-1880). El la franca trad. Lucien Bourgois, Philippe Combet. Parizo: UFE, 1989. Antologieto de la franca literaturo. 64p. 21cm. Du noveloj de la franca "impresionista" romanisto, kiuj redonas lian bildokrean verkteknikon kaj profundan pesimismon. 6,90 gld.

Sonĝe sub pomarbo. Julio Baghy (1891-1967). La Laguna: J. Régulo, 1958 (dua bindo Roterdamo: UEA, 1989). Stafeto, Belliteratura serio 14. 221p. 21cm. Versdramo (aŭ "lirika komedio"), en kiu juna amparo sonĝas kondamniĝon al eterna spektado de la tera vivo. 45,00 gld.

Toldi. János Arany (1817-1882). El la hungara trad. Márton Fejes. Budapest: Marci, 1988. 78p. 21cm. Mimeo. Fama hungara epopeo, literaturigita laŭ mezepoka barda kanto, pri popola heroo. 6,00 gld.

Tri aŭtoroj kaj mi. Ignasi Iglèsias (1871-1928), Angel Guimerà (1849-1924), Santiago Rossinyol (1861-1931). El la kataluna trad. Ricard S. Güell, aldonante kvar proprajn verkojn. Barcelona: la tradukinto, 1988. 128p. 20cm. Mimeo. Tri dramoj de "tri kolonoj de la kataluna teatro", plus kvar Esperantaj unuaktaĵoj. 18,00 gld.

Zamenhof, bildrakonte. Red. Ghislaine Tilleux, ilus. Bruno Disano, el la franca trad. Jean-Marc Derzelle. Wilrijk: Sonorilo, 1989. 15+3p. 29cm. Simpla kolora prezento de la vivo de Zamenhof, precipe por infanoj. 18,00 gld.

MENDU ĈE LA LIBROSERVO DE UEA, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando. Bonvolu atenti, ke al ĉiuj netaj prezoj de libroj sendotaj al adresoj en Nederlando aldoniĝas 6%, al tiuj de diskoj, insignoj k.s. 18,5% por la enlanda imposto. Al ĉiuj netaj prezoj aldoniĝas 10% por sendokostoj. Minimumaj sendokostoj estas 5 gld. Antaŭdankon pro via mendo!

Reagoj

La redakcio bonvenigas viajn reagojn al temoj lanĉitaj en niaj paĝoj. Bv. skribi koncize kaj klare, prefere kun spacoj inter la linioj. Ni rezervas la rajton mallongigi leterojn por aperigo. Spaco malpermesas, ke ni publikigu ĉiujn – sed ĉiuj estas nepre bonvenaj!

Ne kritiku! – uzu!

La komentoj pri la Akademiaj landnomoj en la julia-aŭgusta numero (sub la rubriko “Fake”) estas ne-akcepteblaj en tiel grava revuo.

Ĉu ni ne jam sufiĉe diskutis pri landonomoj? Ĉu ne estas finfine tempo transiri al *solvado* de la problemoj? La sola *praktika* vojo al solvo estas ekuzo de la Akademia normo. Ekzistas pli gravaj aferoj por diskuti!

La listo ne donas *oficialajn* radikojn, sed *normajn*. Tio ebligas daŭran aktualigon de la listo, kiam nomŝanĝoj de landoj okazas.... Ke oni sekvu la dezirojn de la koncerna registaro estas memkompreneblaĵo, kaj ĉiuj lingvoj normale faras tion. Tio ne koncernas la Akademian liston, kiu nur donas *Esperantajn* formojn de la landonomoj. Ni apenaŭ povas atendi, ke la registaro provizos tiajn!

La kazo *Koreo* estas pli dorna afero, kiu verŝajne ne solviĝos tre rapide. Tamen tiuj, kiuj ne povas akcepti la formon *Koreo*, ne pro tio devas forĵeti la tutan Akademian liston. Uzu tamen la reston!

Kial kelkaj emas nur kritikadi kaj diskutadi anstataŭ labori por unueco en la lingvouzo? Ne eblas trovi iujn idealajn landonomojn, ĉar ĉiuj havas malsamajn preferojn, sed ja eblas akiri

pli unuecan uzon. La Akademia normo estas sufiĉe bona por fariĝi nia normo. Agu kiel la magazino *Monato* – uzu ĝin!

Bertilo Wennergren (Svedio)

Ĝojige ke vi ne cedis al la Akademiaj klopodoj altrudi certajn formojn de Esperantaj landnomoj, kiujn la tiulandaj Esperanto-parolantoj ne povas akcepti. Tia trudado sentiĝas fremda al la Esperanta kulturo.

Malĝojige, cetere, ke la Akademio en sia periodaĵo uzas arogantan kaj malaltnivelan polemikadon, kio estas tute malinda kaj malutila por instanco kiu anstataŭe devus krei ĉirkaŭ si respekton kaj fidon.

Preben Bagger (Danio)

Praktiko laŭ prediko?

Kvankam la Esperanto-movado bezonas optimistajn aktivulojn, tamen permesu ankaŭ pesimistan pasivulon disvastigi sian opinion pri la perspektivoj de Esperanto, kiel elirpunkto por sanige sinkritika debato.

Antaŭ dek jaroj profesia ĵurnalisto en Augsburg, FRG, s-ro Stefan Maul, fondis kaj ekredaktis monatan revuon, *Monato*. S-ro Maul ne nur celis aperigi regule revuon kies enhavo estas tre riĉa pri diversspecaj aktualaj temoj, sed

ankaŭ deziris ke ĝi akiru tiom da legantoj ke ĝi eĉ povus atingi prestiĝon ĉe neesperantlingvaj personoj. Multaj Esperanto-parolantoj ofte asertas, ke ilia mondlingvo bonege funkcias por diversspecaj celoj. Ĝuste, sed kvankam tia revuo, kia *Monato*, estas unu el la plej trafaj propagandiloj por montri ĝuste la multflankan funkcion de Esperanto, tamen la plej multaj Esperanto-parolantoj prefere abonas kaj legas publikigaĵojn, eĉ tre malimponajn bultenojn, kies ĉefa enhavo gurdas pri Esperanto kaj pri esperantistoj.

Tiom longe, ke malmultaj volas subteni realismajn entreprenojn por pli bona reputacio de la lingvo, ekz. amasa abonon de *Monato*, disvastigon de informoj pri la Akademio de la Sciencoj San Marino, do *per*-Esperantan agadon, tiom longe restos la Esperanto-parolantaro malmultnombra.

Bertil Englund (FR Germanio)

Ankoraŭ pri la simbolo

Rilate al la diversaj opinioj pri la Esperanto-simbolo, plej laste tiu de Anja Launiainen en junio, p.118:

Ĉar la signifo de la du “E”-oj kiuj sin rigardas por formi unuon estas pli forta ol la stelo, mi preferas ke la signo de la centjaro fariĝu la konstanta signo de Esperanto.

Nekrologoj

Bertil ÅKERBERG (1911-1989), dum pli ol 20 jaroj la respondeca eldonanto de la sveda revuo *La espero*, mortis meze de majo en Stokholmo.

Maria ANGELOVA, operkantistino kiu kontribuis per sia arto al pluraj Universalaj Kongresoj, forpasis antaŭnelonge en Sofio, Bulgario.

Cezar APREOTESEI (1922-1989), universitata docento kiu dum multaj jaroj estis kolono de la movado en Rumanio, forpasis en Timișoara la 19-an de julio.

George B. ATKINSON (1904-1989), delonga membro de UEA kaj granda Esperanto-vojaĝanto, mortis fine de la 74-a Universala Kongreso en Braĵtono.

Jeñiel BEN-ALTER (1907-1989), kiu dum longa tempo estis la peranto de UEA en Israelo, mortis ĉi-jare en Petah Tikva. Eklerninte Esperanton 14-jara, li gvidis multajn kursojn, tradukis hebreajn kantojn, kaj oficis kiel redaktoro, sekretario kaj prezidanto en la landa movado.

Alberto DAS NEVES MILHOMENS (1915-1989), tre aktiva esperantisto kaj UEA-delegito en Belém, Brazilo, forpasis tie la 21-an de marto.

Julius HECHT, esperantisto de ĉ. 60 jaroj, aktiva en sia naskolando Rumanio kaj poste en Israelo, forpasis la 20-an de julio en Kirjat Gat. De multaj jaroj li

regule subtenis la agadon de UEA ĉe Unuiĝintaj Nacioj.

HONFAN (plumnomo de ZHANG Hongfan, 1910-1989), la ĉefredaktoro de la granda *Esperanta-ĉina vortaro* (1987) kiu restas unu el la plej imponaj naci-lingvaj vortaroj, forpasis la 31-an de julio en Pekino. En la kvardekaj jaroj li aktive instruis Esperanton en Chongqing kadre de la fama Koresponda Esperanto-Lernejo, samtempe redaktante la revuon *Ĉina esperantisto*. Li poste fariĝis unu el la fondintoj de *El Popola Ĉinio*. Produktiva verkanto kaj tradukanto, kiu i.a. aperigis ĉinan version de *Historio de la lingvo Esperanto* de E. Privat, li dediĉis la lastajn dek jarojn al vortara laboro. Ĝis sia morto li prilaboris la

Estas tamen konsilinde ke ĝi estu akompanata de taŭga klarigo por la ekstermovaduloj kaj por ĉiuj, kiuj havas okazon ĝin legi.

Pro tio mi proponas ke supre aperu la vorto “Esperanto” kaj malsupre la klarigo “Internacia Lingvo”, se eble kun la aldono “ekde la jaro 1887” aŭ “de 1887”, tiel ke la signo fariĝu konstanta prezento-karto sur la kovertoj. Kiam ne temas pri internacia instanco, la indikoj devus esti en la koncerna nacia lingvo.

Umberto Stoppolini (Italio)

La niaopinie neprudenta insisto anstataŭigi la ĝisnunan emblemon de Esperanto per alia... fakte enkondukus plian problemon en nian movadon, ĉar ja multaj esperantistoj neniel rezignos la verdstelan simbolon, kiu jam longatempe estas fariĝinta “signo de laboro”, kiel diris Zamenhof.

Verdire nia verda stelo ne estas iu vakua insigno, tial ke ĝia verda koloro simbolas la esperon, kaj la kvin pintoj – la kvin mondopartojn.

Ni ree demandas al ni, ĉu plia afero, nome la Esperanta simbolo, ankoraŭ disdividos nin plu?

ĉerpita el la revuo de Kultura Asocio Esperantista (Katalunio/Hispanio)

Bonega okazo iomete fiaska

Ni en Itabuna ricevis per telefakso kopion de *La esperantisto* la 1-an de septembro. Certe estis bonega okazo por propagandi la internacian lingvon, kaj ni vere profitis. Multaj ĵurnaloj aperigis la novaĵon; la radiostacio elsendis ĝin kelkfoje; la du lokaj televid-stacioj ĉeestis en la poŝtofiĉejo

kaj montris dum siaj novaĵhoroj la momenton de la ricevo, intervjuis la kvar UEA-delegitojn kaj la poŝtofiĉej-estron....

Bedaŭrinde ni anoncis tra la regiono, ke ni ricevos la tutan ĵurnalon, kaj fakte ni ricevis nur la unuan paĝon, kiun cetere ni jam konis pere de la propaganda materialo antaŭe sendita. Tio estis iomete fiaska. Ĉu vi povus diri, kial ne alvenis la tuta ĵurnalo? Ĉiukaze estis bela festo.

Hilmar Ilton Santana Ferreira (Brazilo)

Red.: Ŝajnas, ke iom malfrue en la preparoj la laborgrupo konstatis, ke estos tro temporabe kaj tial multekoste sendi ĉiujn ok paĝojn. Ĉiu do ricevis nur la unuan paĝon, bedaŭrinde sen antaŭaverto.

Fine pri transitiveco

Kun granda intereso mi legis la reagon pri transitiveco de Paul Hopkins (junio, p.119) kaj la artikolon de Otto Prytz (julio, p.131). [Tamen] mi timas, ke la plimulto de la homoj... ne povas uzi praktike ambaŭ prezentadojn. Ili estas tro altnivelaj.

Laŭ mi, ĉar Esperanto akceptis la uzon de la sufikso “iĝ” por esprimi la pasivon (anstataŭ la 6-a Zamenhofa regulo), ni rajtas diri “La libro vendiĝas bone”. Sed aliaj... rajtas diri “La laboro komencas”, bazante sin sur la principo de neceso kaj sufiĉo.

Heinrich Ringli (Svislando)

La iom kompleksan analizon de s-ro Prytz mi trovis tre interesa, sed pli akademia ol praktika. La punkto, kiun mi volas emfazi, estas... ke troviĝas

nenia konsekvenceco en la maniero, laŭ kiu Zamenhof (kaj aliaj) asignis la koncernajn verbojn al unu aŭ alia kategorio....

Precipe pro tiu kialo, mi proponis kiel la plej simplan solvon de la problemo... ke ni *toleru* la uzon de tiaj verboj senŝanĝe en ĉiuj sencoj, kondiĉe ke la senco de la frazo restu klara. Puristoj kaj lingvotalentuloj povus daŭre uzi la “ĝustajn” formojn.

Alan Towsey (Aŭstralio)

*Red.: Ŝajnas al mi, ke ni sufiĉe aerumis la demandon. Fakte tia tolerado jam okazas en la parola lingvo kaj certagrade en la skriba. Kiel kutime, la normoj de praktika uzo estas malpli striktaj ol la teoriaj. Pri la teorio, tamen, ni lasu la lastan vorton al Zamenhof (Lingvaj respon-
doj 44):*

*“En la frazo ‘la akvo plenigas la kruĉon’ la senco diras al ni, ke la sufikso ‘ig’ estas necesa, kaj uzi tie la vorton ‘plenas’ anstataŭ ‘plenigas’ mi ne konsilus, ĉar tiam ni tro evidente pekus kontraŭ la logiko. Forlasi iun sufikson, por ricevi vorton pli mal-longan, ni povas nur en tiaj okazoj, se la neceseco de la sufikso estas iom duba, ekzemple kiam la verbon, de ni uzatan, ni povas rigardi ne kiel devenantan, sed kiel memstaran, aŭ kiam la maniero de la deveno estas ne tute klara. Sed la verbo de la supre citita frazo ne sole tute sendube devenas de **alia** vorto (‘plena’), sed la maniero de tiu devenado estas tute **klara**, sekve ni devas uzi tiun klaran sufikson, kiu servas por la devenigo de la dirita vorto.”*

Per tio ni fermas ĉi tiun temon.

manuskripton de pli granda laŭtema vortaro de Esperanto.

G. H. KOUDIJS (1883-1989) mortis la 4-an de julio en Utrecht, Nederlando. Esperantisto de pli ol sesdek jaroj kaj fidela membro de UEA, li aktivis por la lingvo ĉe sia metilernejo, landnivele kaj internacie.

Prof. d-ro KUWAHARA Tosihide (1910 -1989), direktoro de Japana Esperanto-Instituto kaj fakdelegito pri kemio, forpasis la 14-an de junio en Kioto.

Rufino LOPEZ CEPERO (1925-1989) mortis la 13-an de majo en Havano, Kubo, kie li estis la vicdelegito.

Manuel NEBRA-VAL (1914-1989), multjara fidela membro de UEA, fervora filatelisto kaj dum kvar jardekoj aktivulo de la venezuela movado, forpasis en Karakaso la 26-an de septembro.

Karl SIMON (1896-1989) mortis la 12-an de aŭgusto en Munkeno, FR Germanio, kie li estis fakdelegito pri fervojoj dum trideko da jaroj.

Georges VAMBREUSE (1904-1988), multjara membro de UEA kiu dum 20 jaroj instruis Esperanton en Verviers, Belgio, forpasis tie la 23-an de septembro pasintjare.

P. H. VAN TERWISGA (1911-1989),

la delegito sur la insulo Vlieland, Nederlando, forpasis en aŭgusto post longa malsano. Ĝis sia morto li energie pledis kaj aktivis por la uzo de Esperanto en unuiĝinta Eŭropo.

Dora WUNDERBAUM (1908-1989), dum tridek jaroj delegito en Telavivo kaj aktivulo de la israela movado, mortis la 11-an de septembro. Naskita en Varsovio en la familio Tannenbaum, kun patro kiu apartenis al la rondo de Zamenhof mem, ŝi lernis Esperanton de Lidja en la dudekaj jaroj.

Ary ZAMORA (1898-1989) mortis antaŭ kelkaj monatoj en Porto Alegre, Brazilo, kie li estis la delegito dum pli ol sesdek jaroj.

• **Scienca bukedo:** Jam aperis du numeroj de ĉi tiu iniciato de Christian Bertin, 60, allée de la Renaudière, F-35510 Cesson-Sevigne, Francio. Temas pri kolekto de originalaj kaj tradukitaj sciencaj artikoloj, faritaj de franca kolektivo (nun ok-membra). La prezento estas neluksa, sed la lingva kaj enhava niveloj estas altaj.

• **Brazila esperantisto:** Finfine la brazila movado sukcesis lanĉi sian revuon; laŭ la redaktoro Itacir Luchtemberg, precipe monmanko malhelpis ĝian pli fruan aperon. Ĝi estas plene esperantlingva, kun rubrikoj pri Brazilo, la movado, la lingvo, recenzoj, libera forumo ktp. La nivelo plene respondas al la atendoj pri unu el la plej viglaj landaj movadoj. Mendu ĉe BEL, CP 11-1105, BR-70084 Brasília.

• **Survoje:** Ankoraŭ aperis nur prov-numero de ĉi tiu "organo de Unuiĝo por Novtipa Internacia Kulturo (UNIKO)" – vidu la anonceton en oktobro. Espereble oni sukcesos trovi eldonejon, ĉar la enhavo estas promesplena. Artologio, estetiko, literatura pensado de P.A. Florenski, originala poezio kaj prozo, tradukoj... plejparte el rusa kulturfono, kio bonvenas post jardekoj da silento. Redaktas A. Fjodorov, Pk. 913, SU-432032 Uljanovsk, Sovetunio.

• **Sovetunio:** Ni nur memorigas vin, ke la sovetianoj (re)lanĉis tutan aron da revuoj, plejparte internacie haveblaj. Notu la adresojn sub "Kure tra Sovetio" kaj skribu al la redakcioj!

• **Panoramo:** Tiu ĉi estas la nomo de nova bulgarlingva revuo, kiu ĉerpas el la movadaj temoj kaj tekstoj por informi la nacian publikon pri Esperanto kaj la mondo. Sed ĝi estas ankaŭ taŭga vorto por priskribi la buntan gamon da periodaĵoj, kiun perestrojko lanĉis en Orienta Eŭropo. En Bulgario, ankaŭ kvazaŭ nova estas la multe plibonigita *Bulgara esperantisto*, kaj vere nova, kvankam ankoraŭ ne tro interesa, la junulara organo *Saluton* (strange, ke ĝi samnomas kiel la reviviĝinta brita kuzo!). Fratina periodaĵo aperas ĉe la vigla studenta movado en Pollando, *Studenta gazeto*, kaj samlande *Pola esperantisto*, denove regule atingas la legantojn, nun allasante diskutojn kaj polemikojn (ĉu ĉiujn?). Najbare en GDR, la nete prezentita, bone redaktita *Saksa kuriero* promesas fariĝi tutlanda revuo, kion sude ambicias ankaŭ *Jugoslavia stelo*, mal-

regule aperanta sed ĉiam pli interesa. *Hungara vivo* estis streĉe atentokapta ĉi-jare, pro viglaj kaj vere komprenigaj raportoj pri la ŝtorma politika evoluo; bedaŭrinde ni aŭdas onidirojn, ke la fiaskanta ekonomio devigos ĝin fermi la oficejon post la jarfino.

• **Avanco** estas la krio de Kuba Esperanto-Asocio, unue aŭdigita la 16-an de junio. Redaktorino Maritza Gutiérrez celas interalie montri, ke ne ĉiuj kubanoj tradukas laŭ la fuŝa stilo de samlandano Aguila (nu, tion ŝi ne diras, sed komprenu kiu volas...). Ankaŭ ceterpaĝe la revuo allogas, aparte por ironioj al Havano. Skribu al KEA, Pk. 2018, C-10200 Havano 2.

• **Ĉu ni dronos?** malavance krias *La kancerkliniko*, kies ĉefo Ĵak Le Puil (Les Cocherats, F-18210 Thaumiers) eksentas la akvon ĉirkaŭ siaj piedoj (aŭ ĉu jam kolo?). Lia internacia kontribuanto (poloj, hungaroj, sovetianoj, usonanoj, francoj kaj pli, nur en unu numero!) tamen ne allogas abonojn. Repripensu kaj sendu vian savan abonpeton jam nun.

• **Centrafrika Respubliko:** La unua studreferaĵo pri Esperanto en ĉi tiu lando, kaj kredeble en tuta Afriko, estis verkita kaj defendita de studento Idriso Musa (Bangia Universitato) pasintan julion. La 36-paĝa eseo komparas la relativan lern-facilecon de Esperanto kaj la angla.

• **Ĉinio:** La televida Esperanto-kurso farita en Ĉindao gajnis en aprilo la unuan premion por ĉina televida instrufilmo. Partoprenintoj de la UK en Roterdamo memoras la viglajn kaj realecajn dialogojn, karakterizajn por la kurso.

Ekzistas nun E-asocioj en tri naci-malplimultaj aŭtonomaj subprovincoj en Ĉinio, situantaj en la provincoj Xinjiang (ĉanĝi-huj-nacia), Jilin (kore-nacia) kaj Guizhou (boŭĵej-mjaŭ-nacia).

• **FR Germanio:** La bibliotekon de Germana E-Instituto transprenis la urba biblioteko de Aalen, kies urba registaro investas konsiderindan monsumon por

Foto: Kamil Tyl




• **Ĉeĥio:** De la 25-a ĝis la 27-a de aŭgusto 1989, Ĉeĥa E-Asocio festis sian 20-jariĝon en Havířov. Ĉeestis ĉ. 250 ĉeĥaj movadanoj kaj, inter la eksterlandaj gastoj, eksestrarano de UEA Yosimi Umeda kaj nova estrarano Roman Dobrzyński (ambaŭ meze en la foto, kun IFEF-prezidanto Joachim Giessner, dekstre, kaj ĈEA-prezidanto Petr Chrdle). La datreveno koincidas kun la 100-a datreveno de Esperanto en Ĉeĥoslovakio: en 1889 17-jara studento F.V. Lorenc transiris de Volapük al Esperanto kaj komencis instrui la lingvon. (Kvar jarojn poste li elmigris al Brazilo, kies movado ankoraŭ memoras lin kiel F.V. Lorenz.)

prizorgi ĝin. Temas pri dekmilo da libroj, revuoj ktp. Oficiala malfermo okazos la 15-an de decembro.

• **Germana DR:** Unu el la ĝis nun malmultaj internaciaj renkontiĝoj en GDR okazis de la 23-a ĝis la 25-a de junio, kadre de la nacia Agrikultura Ekspozicio en Leipzig. Partoprenis ĉ. 250 esperantistoj el 11 landoj. Ok prelegoj tuŝis i.a. ekologiajn, hobiajn kaj Esperantajn temojn.

Hispanio: La vaska provinca registaro eldonis Esperantan version de vidbendo pri Vaskio, regiono ĉe la norda marbordo de Hispanio kun sia propra lingvo kaj apartaj tradicioj. Ĝi senpage mendeblas pere de Grupo Esperantista de Bilbao, Barrencalle Barrena, 7-1, E-48005 Bilbao.

Komisiono por la starigo de Zamenhof-monumento en Sabadell, Katalunio, post dujara laboro anoncis la komencon de la konstruado. La monumento staros en bulvaro Zamenhof, kiu datiĝas jam de 1912.



HELPU AL UEA TROVI MILON PLI DA MEMBROJ

La apudan varbilon kaj aliĝilon ricevis jam preskaŭ 10000 delegitoj, kongresanoj, oficejoj de Landaj Asocioj kaj aliaj. Ĉu vi konas aliajn homojn, kiuj interesiĝas pri la movado en monda skalo? Ĉu vi organizas kurson, renkontiĝon, lokan klubon? Petu stokon da informiloj de la CO: UEA pliefikiĝos nur per via helpo!

...kaj remembriĝu frue por la jaro 1990.
Antaŭdankon pro via subteno!

Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando

• **Ukrainio:** Okaze de la 175-a datreveno de la naskiĝo de Taras H. Ŝevĉenko, renoma ukraina poeto kaj pentristo, la eldonejo "Naukova dumka" aperigis libron de 150 tradukoj de unu lia poemo,

"Testamento". Krom Esperanta traduko fare de Nadija Andrianova-Hordijenko, kvar nacilingvaj tradukoj – en la irlanda, gaela, kimra kaj malta – estas faritaj per uzo de Esperanto kiel pontlingvo.

Fake

• **Alkoholismo:** En la usona urbo Seatlo, ŝtato Vaŝingtono, fondiĝis verŝajne la unua kaj sola esperantlingva grupo de Alkoholuloj Anonimaj: konata internacia organizaĵo, kiu provizas solidaran helpon por homoj kun troa drinkemo. Ĝi celas kunligi esperantistojn el diversaj lokoj per korespondado, fojaj kunvenoj kaj komuna organo *La verda vito*. Ĝi ankaŭ ellaboros materialojn pri alkoholismo en Esperanto. Interesitoj skribu al "Sobraj Verduloj", 204 N. 39th Street, Seattle, WA 98103.

• **Homaj rajtoj:** Sekve al la ekuzo de Esperanto por sia monda kampanjo "Homajn rajtojn nun!", Amnestio Internacia eldonis bazan informilon pri sia laboro en la internacia lingvo. Kontakto vian lokan filion, aŭ petu de la Internacia Sekretariato, 1 Easton St., London WC1X 8DJ, Britio.

• **Informado:** Germana E-Junularo ĉi-jare lanĉis novan serion de informiloj, celataj specife al juna publiko. Thomas Pusch (ankaŭ TEJO-komisiito pri varbado) verkis kaj ilustris viglan 40-paĝan enkondukon al la lingvo kaj movado, *Esperanto Schritt für Schritt* (paŝon post paŝo), haveblan kontraŭ 3 irk de GEJ, Rheinweg 15, D-5300 Bonn.

• **Instruado:** Germain Pirlot denove alvokas por informoj pri (a) la leĝa situacio de E-instruado en elementaj, mezgradaj kaj superaj lernejoj, kaj (b) aktualaj kursoj en universitatoj kaj superaj lernejoj. Skribu al li ĉe: Kemmelbergstr. 5 B 3, B-8400 Oostende, Belgio (post 20 dec.: Steenbakkersstr. 21, B-8400 Oostende).

• **Masaĝo:** Aziaj esperantistoj aktivas por diskonigi ĉi tiun antikvan kurac-metodon. Ĉinaj specialistoj produktis, kunlabore kun *El Popola Ĉinio*, 75-minutan vidbendon kiu demonstras la kuracon de kelkaj oftaj malsanoj sub la nomo "Ĉina masaĝo" (mendu kontraŭ US\$80 de EPĈ). Kaj japana masaĝisto Masayuki Saionji verkis ilustritan gvidlibron pri "Orienta speciala diina masaĝo", por kiu li ankaŭ produktos vidbendon (Pk. 405, CPO, Tokio).

• **Muziko:** Andreo Marshall (42 High Street, Waltham Grimsby, S. Humberside, DN37 0PL Britio) entreprenas la kompiladon de nova muzika terminaro, aranĝita kiel tiu de Butler kaj Merrick (1960) sed kun pli da terminoj, ekzemploj kaj indekso. Kunlaboremuloj bv. kontakti lin (se eble aldonu irk-on).

• **Scienco:** Akademio de la Sciencoj San Marino okazigis sian sesan Sesion inter la 26-a de aŭgusto kaj la 4-a de septembro, en Borgo Maggiore, Sanmarino. Partoprenis ĉ. 90 studentoj kaj instruistoj, el kiuj 15 sukcesis adapti aŭ akiri akademian gradon pere de ekzameno. Novajn sektorojn, Teknikan kaj Artan, inaŭguris resp. d-ro. Ludoviko Zaleski-Zamenhof kaj Rikardo Ŝulco.

• **Skoltoj:** Granda skolta tendaro "Tervas 90" okazos en Kannonkoski, Finnlando, de la 1-a ĝis la 9-a de aŭgusto 1990. Finnaj esperantistoj kunordigas Esperanto-trupon por ĝis 40 partoprenantoj: kontaktu Carola Antskog, Källkullen, SF-25700 Kimito.

En junio 10 skoltoj el tuta Finnlando partoprenis tendaran E-kurson, sub instruo de Anna Riitamäki kaj Jerzy Handlik. Oni planas du similajn kursojn en 1990.

• **Teatro:** Pola aktorino Jadwiga Gibczynska turneis en aprilo ĉe svedaj E-klubo. Laŭ ideo de Kerstin Rohdin, ŝi prezentis unu sian dramon, pri la sekvoj de nuklea milito, ankaŭ al pluraj lernejoj klasoj, kun samtempa traduko en la svedan. La reagoj de la lernantoj, instru-

istoj kaj gazetaro estis tre pozitivaj. Notindas, cetere, ke la dramo mem estis inspirita de E-traduko el la germana, *La lastaj infanoj de Oldrovalo* (trad. Joachim Giessner, 1987).

• **Vidbendoj:** Kreskas la movada intereso pri ĉi tiu artformo. Sovetianoj anoncis la aperon de bendo pri la junulara renkontiĝo en Minsk, aprilon 1989, kiun reĝisoris populara komponisto Vladimir Soroka (produktinto ankaŭ de granda E-disko "Destin"). Literatura Foiro lanĉis "Kiam Parizo estis Parizo ankaŭ por ni esperantistoj", kvindekjara muzika tra-rigardo de la franca ĉefurbo en plenumo de Nikolin'. Pola reĝisoro Roman Dobrzyński produktis eĉ sep diverstemajn dokumentajn bendojn dum la lastaj tri jaroj. Pola E-Asocio kunlaboras kun profesia entrepreno por fari unuhoran fabelan filmon laŭ la Grabovski-traduko de *La neĝa blovado* (antaŭmendoj bonvenaj!). El diversaj lokoj venas anoncoj pri planata aŭ starigita vidbenda servo. La UEA-komitato proponis en Brajtono la starigo de vidbenda branĉo en la Belartaj Konkursoj, kaj la nova estraro serĉas komisiiton pri la tuta bendomerkato. Ni informos pli detale en posta numero; atentu krome la rubrikon "Laste aperis"!



• **Radio:** La E-sekcio de la Pola Radio proponas konkurson: Kiel ĝiaj elsendoj spegulu la politikajn ŝanĝojn en la lando? Viajn ideojn sendu antaŭ la jarfino al Pk. 46, PL-00-950 Warszawa, Pollando. Aŭskultu la elsendojn por pli da detaloj!

Sekciestro kaj UEA-komitato Andrej Pettyn (foto, dekstre, kun Milada Szvedo) pasigis ĉi-aŭtune preskaŭ tutan monaton en Finnlando, prelegante en E- kaj radio-klubo. Plurfoje li estis intervjuita en la radio kaj gazetaro, ĉiam interalie pri Esperanto, kaj en Helsinko li havis okazon informi finnaj parlamentanojn pri la lingvo.


La Esperanta elsendo de Radio Havano daŭris nun pli ol unu jaron, kaj havas ŝancon fariĝi ĉiutaga. Ĉu aŭ ne tio efektiviĝos, dependos de la subteno de la esperantistaro: sendu apogleteron al la E-redakcio, Pk. 7026, Havano, Kubo. Daŭre bonvenaj estas eldonaĵoj, sonbendoj k.s. por recenzo aŭ aŭdigo.

Persone

• **Io Chou:** La fama ĉina entomologo ricevis inviton de la Internacia Biografia Centro de Usono, ĉeesti feston por soleni la 200-jariĝon de la usona prezidenta sistemo. Prof. Io Chou estas la fondinto de la unua ĉina entomologia muzeo kaj la aŭtoro (en Esperanto) de *Ĉinio marŝas en insekta mondo*.

• **Major:** La redaktoro (kaj ĉefa verkanto) de *Novzelanda esperantisto*, Jozefo Major, la 12-an de junio festis kun sia edzino Eva la 50-an datrevenon de ilia geedziĝo.

• **Mihalkov:** Bulgara literaturisto Georgi Mihalkov, ankaŭ konata kiel la verkisto Julian Modest, transprenis en februaro la postenon de lekciisto pri Esperanto ĉe la Sofia Universitato "Kliment Ohridski". La universitata biblioteko posedas nur magran kolekton da libroj en aŭ pri Esperanto: sendu kontribuojn al la Esperanto-fako, fako "Obsto ezikoznanie", Universitato "Kliment Ohridski", Sofio.



• **Naeem:** La sekretario de Pakistana E-Asocio, Naeem Javaid, pasigis kelkajn semajnojn en najbara Irano dum majo kaj junio. Kun M.H. Saheb-Zamani li studis la organizon de la movado kaj ĝiaj kursoj, cele al pliefikigo de la juna sed promesplena pakistana movado. (foto)

• **Samodaj:** Longa intervjuo kun SEU-prezidanto Vladimir Samodaj aperis en maja numero de *Ekoplanety* (Eŝo de la planedo), populara rusa semajngazeto pri internaciaj novaĵoj. La interparolo tuŝas i.a. la lingvo-problemon, la internacian movadon kaj la persekutojn sub Hitler kaj Stalin.

• **Santiago/McCoy:** La 21-an de novembro geedziĝis Roy McCoy, CO-kompostisto, kaj Izabel Cristina Oliveira Santiago, psikiatro, sociantropologo kaj aŭtoro de la libro *O que é Esperanto*, en civila ceremonio ĉe la roterdama urbodomo. Ĉeestis la tuta stabo de la Centra Oficejo, kune kun aliaj anoj de la Esperanto-komunumo. Neformala lunĉo ĉe la urbocentra restoracio "King's Garden" sekvis la ceremonion.

La novgeedza paro interkonatiĝis dum la volontula servo de fraŭlino Santiago en la CO, de majo ĉi-jare ĝis la Unversala Kongreso en Brajtono. Ili loĝas ĉe Bajonetstraat 78, NL-3014 ZL Rotterdam.

Ĉu vi volas festi vian naskiĝtagon, Novjaron aŭ alian specialan okazon? Ĉu vi serĉas taŭgan lokon por via postgeedziĝa vojaĝo, eble por lanĉi novan esperantistan generacion? Venu en Esperantujon ĉe la suda franca marbordo! (Jarlibro 1989, p.210.)

Nia urbo Speyer fariĝis dumiljara. Bv. sendi salutkartojn al Esperanto-grupo, Nikolaus-von-Weiss-Gymnasium, D-6720 Speyer, FR Germanio.

Filatelistoj kiuj deziras poŝtmarkojn iajn ajn el Zairio, kaj pretas kompanse subteni la Esperanto-klubon de Kinŝaso per mono aŭ materialoj, bonvolu skribi al: Yaba Luntadila, BP 1972, Kinŝasa 1, Zairio.

Kontakton kun kuracistoj, speciale pri muskolmalsanoj, serĉas juna pensiulo: Dimităr Hristov Statev, vilaĝo Dozkovo, regiono Plovdiv, Bulgario. Interesiĝas krome pri bildkartoj kaj libroj.

Deziras kunlabori kun aliaj ensembloj, asocioj kaj individuoj, kiuj okupiĝas pri distraj programoj en Esperanto, la Kabaredo "Amuzo", p/a Pola Esperanto-Asocio en Gliwice, Pk. 21, PL-44-101 Gliwice, Pollando.

Tarifo: Ĉiu vorto de la anoncetoj kostas unu guldenon (unu internacian respond-kuponon). Pri ilia enhavo ne respondecas la redakcio. Ni donas nenian rabaton por la ripeto de anoncetoj. Por la tarifo de anoncoj, bonvolu vidi la kolofonon.

Anoncetoj

Esperanto-revuojn serĉas por klaso de 22 lernantoj en instruista instituto Teresa Jankowska, ul. Iwicka 40 m 18, PL-00-735 Warszawa, Pollando.

Juna medicina studento deziras korespondi pri turismo, historio, lingvoj, aŭtomobilismo: Alonderis Audrius, Grigo 57-9, Panevėžys, Litovio, Sovetunio.

Kun esperantistaj familioj deziras korespondi Alexander kaj Rosa, "Stefan Denĉev" n-ro 14, BG-5000 Veliko Târnovo, Bulgario.

Samaĝulojn por korespondi tutmonde serĉas 11-jara Anton Todorov Todorov, bl. 25 vh. B ap. 76 et. 2, kv. M. Stanev Zapad, BG-6010 Stara Zagora, Bulgario.

Por trankviligi niajn samideanojn tra la mondo kiuj aŭdis pri la grava tertremo kiu frapis nordan Kalifornion kaj kiuj havas E-amikojn ĉi tie, ni volas informi vin ke nia oficejo kontaktis multajn esperantistojn en la trafitaĵoj. Laŭ nia scio, neniu mortis, nek suferis grandan perdon. En nia oficejo, kiu estas rekte trans la golfeto de San Francisko, kelkaj libraj bretaroj falis sur la plankon, sed detruo estis minimuma. ELNA

16-jara kolektanto de bildkartoj, kalendaroj, poŝtmarkoj kaj moneroj deziras korespondi tutmonde: Ivajlo Saŝev Keĥajov, str. Rajna Knjaginja 5 vh. B ap. 16, BG-5004 Veliko Târnovo, Bulgario.

Esperanto floras en la antikva urbo Zhongxiang. Skribu al la nove fondita Zhongxiang-a Esperanto-Asocio, Changshou Zhongxue, Zhongxiang Xian, Hubei, Ĉinio.

Kontaktoj kun samprofesiuloj kaj E-familioj serĉas Svetoslav, radio-jurnalisto pri turismo, kaj Diana, kuracisto pri internaj malsanoj: familio Slavĉev, ul. Naĉo Stefanov 12, BG-9009 Varna, Bulgario.

FERVOJA TERMINARO en Esperanto

eldonis: Terminara Komisiono de IFEF
redaktis: G. Ritterspach kaj H. D. Hartig
suplemento al seslingva oficiala terminaro de la Internacia Fervoj-Unio (UIC), Parizo.

10205 terminoj sur 228 paĝoj, laŭnumere kaj laŭalfabete.
Baza terminologia verko, interesa ne nur por fervojistoj!
Mendu de la Libroservo de UEA. Prezo 15,30 gld.

Claude Piron La bona lingvo

112 p. 14,10 gld.

Vi ne povos diskuti pri Esperanto, se vi ne konas tiun verkon, kiu sensacie klare montras la superecon de la Zamenhofa lingvo.

Ĉi tiu poemaro kvazaŭ inaŭguris la unuan maturan periodon de la Esperanta poezio, per sia intima enhavo kaj melodia stilo.

Edmond Privat Tra l' silento

28 p. 7,80 gld.

Mendu ĉe UEA aŭ ĉe:

PRO ESPERANTO, Postfach 28, A-1014 Wien, Aŭstrio.

Kulturaj Aranĝoj 1990 ĉe Kastelo Grésillon

- 11/4–20/4: **Praktika formado de Esperanto-instruantoj**
Prezento de diversaj metodoj, teoriaj kaj praktikaj konsiloj. Samtempe:
Internacia renkonto de infanoj
Kursoj, redaktado de staĝ-gazeto, promenadoj, distraĵoj.
- 15/6–2/7: **Internacia amika renkonto**
Nedeviga programo: kursoj, gvidata konversacio, komunaj promenadoj kaj ekskursoj, distraj vesperoj.
- 2/7–16/7: **Prelegoj kaj kursoj**
Serio de diversstemaj prelegoj, kursoj por diverslingva lernantaro, gvidata konversacio, ekskursoj, distraj vesperoj.
- 17/7–31/7: **Lernu kaj praktiku (I)**
Kursoj por diverslingva lernantaro, gvidata konversacio, ekskursoj, distraj vesperoj.
- 1/8–15/8: **Lernu kaj praktiku (II)**
Kursoj por diverslingva lernantaro, gvidata konversacio, ekskursoj, distraj vesperoj.
- 16/8–31/8: **Somera lernejo**
kursoj por diversnaciaj lernantoj, "la arto traduki" (2-a semajno), gvidata konversacio, ekskursoj, distraj vesperoj.

Kultura Esperanto-Domo
Kastelo "Grésillon"
F-49150 BAUGÉ, Francujo
telefono: 41 89 10 34
40 76 77 95 (ekstersezono)

Poŝtkonto: Maison Culturelle Esperantiste, Nantes 1485 39
PBankkonto: BPBA Nantes 5801902570 9



Jen ĝi estas – la longe atendita libro:

MEMORLIBRO

GRAZ 1987

LA INTERNACIA JUBILEA ESPERANTO-KONFERENCO CENT JAROJ DE ESPERANTO-KULTURO

Ampleksa raporto pri la plej grava kultura evento en 1987, enhavanta:

1. la lastajn paroladojn de Prof. D-ro Ivo Lapenna kaj de D-ro Paul Neergaard;
2. superrigardon de la 100-jaraj kulturaj atingoj. Lekciistoj: Albault, Régulo Pérez, Gacond, Marjorie Boulton, Ragnarsson, Neergaard, de Zilah, Mayer, Thierry, Zelazny, Lapenna;
3. rezoluciojn, fotoreportaĵon ktp.

Eldonita de "FONDAĴO IVO LAPENNA", redaktita de D-ro Klaus Perko, Aŭstrio.

Formato A5, broŝurita, 170-paĝa, verdkolora, glita kovrilo. Prezo: 175 d.kr. inkl. afranko.

Mendu ĝin ĉe la Libroservo de UEA (50,70 gld.) aŭ rekte ĉe "FONDAĴO IVO LAPENNA",
kasisto: Peter Zacho, Nørregårdsvej 91, DK-2610 Rødovre, Kopenhago, Danio, pĉk.: København 1190601.

Bulgara Esperantisto

organo de BEA

Riĉa primovada kaj kultura enhavo, tribuno de diversaj opinioj, moderna ilustrita aspekto, ĉiumonate 32 paĝoj.

Serĉataj perantoj eksterlande, rabato 25%.

Jarabono ĉe UEA: 32 gld.

Adreso: BEA, p.k. 66, BG-1000 Sofio, Bulgario

Zamenhofage...

kion pli bone donaci (aŭ ĝui mem) ol libron humurplenan kaj kortuŝan, profunde homaman en agrable granda litertipo, ĵus premiitan kiel infanlibron sed valoran por ĉiuj aĝoj:

Anne Frank ne estas de hieraŭ

de Mies Bouhuys, trad. de Nora Bartels

Aĉetu ĉe la Libroservo de UEA. 15,00 gld.;

kvantojn eblas mendi rekte de la Delegito:

Nora Moerbeek, Zwaansmeerstraat 48,
NL-1946 AE Beverwijk, Nederlando.

HEROLDO

DE ESPERANTO

LA PLEJ OFTA GAZETO DE LA ESPERANTO-MOVADO

De 68 jaroj je la servo de la Internacia Lingvo

- 16 numeroj jare
- Aktualaj ilutraitaj raportoj el la tuta mondo
- Junulara, instruista, literatura rubrikoj, librorecenzoj, listo de fakaj artikoloj en Esperanto
- Duobla kongresa numero, kalendaro de internaciaj renkontiĝoj kaj kongresoj
- Libera tribuno de la legantoj, anoncetoj, ŝak-problemoj, krucvortenigmoj, foto-filmo
- Sciencaj suplementoj, ktp.

Jarabono: 19,00 usonaj dolaroj aŭ egalvaloro

Abonebla ĉe la Landaj Perantoj aŭ ĉe UEA
(43 guldenoj; aldonaj kostoj por aera sendo)

Mendu provnumeron ĉe la redakcio: Via N. Sandre 15, I-10078 Venaria Reaoe (TO), Italio

Redaktorino: Ada Fighiera-Sikorska